


Revuo
ESPERANTO

Internacia

N-ro 591 (2) FEBRUARO 1955



**Montevideo—sceno de la plej grava oficiala rekono de Esperanto
dum ĝia 67-jara ekzisto.**

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : R. ROSSETTI
39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj
Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 7000



Enhavo

	paĝo
La venko en Montevideo : <i>La Prezidanto</i>	33
Esperanto antaŭ Unesko, raportaro :	
Originalaj tekstoj de Unesko-rezolucio	34
La signifo de la decidoj de Unesko : <i>D-ro I. Lapenna</i>	35
Unesko rekonis la valoron de Esperanto : <i>Prof. D-ro I. Lapenna</i>	37
Aldono A : Parolado de Prof. Ivo Lapenna en la program-komisiono de Unesko, 4 Dec., 1944	54
Aldono B : La "diskuto" pri Esperanto en Unesko : <i>Prof. Manuel Fernández Menéndez</i>	55
Aldono C : Letero al Ĝenerala Konsulo de Danlando	56
Aldono D : Letero de Prof. Lapenna al la Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco	57
Aldono E : Letero de D-ro Lapenna al la Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco	60
Publika dankesprimio : <i>Ivo Lapenna</i>	66
Esperanto en la dokumentoj de Unesko	67
La Universala Esperanto-Ekspozicio en Montevideo	61
Pensoj post Montevideo : poemo de <i>William Auld</i>	60
40-a Universala Kongreso :	
Oficiala komuniko N-ro 3	68
Konstantaj rubrikoj :	
Tra la mondo esperantista	69
Enigma konkurso	70
Nekrologo	70
Radio	71
Oficiala informilo	72
Internacia Konkurso	72

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 591

Februaro 1955



La venko en Montevideo

KIEL novjara saluto, certe kun aplaŭdo akceptita de vi ĉiuj, aperis en la januara numero la Rezolucio akceptita de Unesko.

La esperantistaro kun entuziasmo apogis la ideon, ke UEA sendu reprezentanton al la konferenco en Montevideo, kaj ofere kontribuis por realigi tion.

Renkontis nian reprezentanton, D-ro Lapenna, amasoj da obstakloj, kiuj necesigis lukton ĝis la plej lasta momento de la konferenco. Ĝisekstreme li devis streĉi siajn fortojn por konduki la ŝipon en la havenon. Plurfoje rokoj, ŝajne neeviteblaj, minacis, sed la lerta kondukisto kapablis sekurigi la veturon ĝis la celo. Pri sia komision li rakontas en tiu ĉi numero nervotiklan historion.

D-ro Lapenna plenumis sian komision perfekte. Kaj je la reveno en Eŭropon li akceptu niajn plej korajn kaj sincerajn komplimentojn !

La lukto en Montevideo estas finita. Novaj perspektivoj malfermiĝis. Ne estas permesate nun resti pasiva, meditante pri la venko atingita. Nun ni devas eluzi la venkon, ĉar se ni ignoras tion, ni vane ekagis. Estas la tasko de vi ĉiuj utiligi la rezolucion laŭ plej taŭga maniero. Kaj estas la tasko de UEA subteni, doni konsilojn kaj liveri dokumentojn pri tio. Estos aparte la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de UEA (=CED), sub gvido de D-ro Lapenna, kiu devos transpreni tiun fakon. Sed la agado de CED grandparte dependas de la mono disponebla. Mi apelacias al vi, ke vi—kiel dankesprimon al D-ro Lapenna—faru vian donacon al CED por doni al ĝi eblecon labori kiom eble plej amplekse.

Vivu Esperanto !

*E. Malmgren,
Prezidanto de UEA.*

★★Ĉi tiu numero de nia organo raportas detale, kun ĉiuj gravaj dokumentoj, la triumfon de Esperanto antaŭ UNESKO en Montevideo. La streĉa rakonto malkaŝas la plenan dimension de tiu historia venko por nia afero. Pluaj ekzempleroj de ĉi tiu numero estas haveblaj ĉe nia Administrejo po 1,5 ŝil. (1/6) aŭ egalvaloro.

Originalaj Tekstoj de la Unesko-Rezolucio pri Esperanto en la Hispana, Angla kaj Franca Lingvoj

Ni publikigas ĉi sube la originalajn hispanan, anglan kaj francan tekstojn de la Rezolucio 8C/DR/116, kiun akceptis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en la lasta kunsido de la Plena, la 10-an de Decembro 1954 ; kun ankaŭ la Esperanta traduko el la hispana originalo :—

HISPANA TEKSTO

8C/DR/116

La Conferencia General, habiendo considerado el Informe del Director General sobre la Petición Internacional en favor del Esperanto,

(1) se da por enterada de los resultados alcanzados por el Esperanto en la esfera de las relaciones intelectuales internacionales y en el acercamiento de los pueblos del mundo ;

(2) reconoce que esos resultados responden a los fines e ideales de la U.N.E.S.C.O. ;

(3) aconseja al Director General que siga la evolución del uso del Esperanto en la ciencia, la educación y la cultura y, con tal fin, colabore con la Asociación Universal de Esperanto en asuntos que conciernan a ambas organizaciones ;

(4) convoca a los Estados Miembros que han expresado estar dispuestos a establecer o ampliar la enseñanza del Esperanto en las escuelas, para que informen al Director General acerca de los resultados obtenidos en ese campo.

ANGLA TEKSTO

8C/DR/116

The General Conference, having discussed the Report of the Director-General on the International Petition in favour of Esperanto,

(1) takes note of the results attained by Esperanto in the field of international intellectual relations and in the rapprochement of the peoples of the world ;

(2) recognizes that these results correspond with the aims and ideals of U.N.E.S.C.O. ;

(3) authorizes the Director-General to follow current development in the use of Esperanto in education, science and culture, and, to this end, to co-operate with the Universal Esperanto Association in matters concerning both organizations ;

(4) takes note that several Member States have announced their readiness to introduce or expand the teaching of Esperanto in their schools and higher educational establishments, and requests these Member States to keep the Director-General informed of the results attained in this field.

FRANCA TEKSTO

8C/DR/116

La Conférence Générale, après discussion du Rapport du Directeur Général sur la Petition Internationale en faveur de l'Esperanto,

(1) note les résultats obtenus au moyen de l'Esperanto dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapprochement des peuples ;

(2) constate que ces résultats correspondent aux buts et idéaux de l'U.N.-E.S.C.O.,

(3) autorise le Directeur Général de suivre les expériences que représente l'utilisation de l'Esperanto pour l'éducation, la science et la culture et, dans ce but, collaborer avec l'Association Universelle de l'Esperanto dans les domaines intéressant les deux organisations ;

(4) note que plusieurs Etats Membres se sont déclarés prêts à introduire ou à développer l'enseignement de l'Esperanto dans leurs écoles primaires, secondaires ou supérieures, et invite ces Etats Membres à tenir le Directeur Général informé des résultats obtenus dans ce domain.

ESPERANTA TEKSTO

La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto,

(1) notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo ;

(2) rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O. ;

(3) instrukas la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn ;

(4) notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo.



La Signifo de la Decidoj de Unesko

LA Ĝenerala Konferenco de UNESKO faris rilate al Esperanto du distingajn decidojn: la 8-an de Decembro ĝi konsentis al UEA la konsultajn aranĝojn, la 10-an de Decembro ĝi akceptis la Rezolucion, kiun ni publikigas aliloke.

La Rezolucio

Por bone kompreni la signifon de la Rezolucio estas necese memori ankoraŭfoje, ke UNESKO estas *interŝtata* organizaĵo. Ĝia supera organo estas la Ĝenerala Konferenco, kiu konsistas el reprezentantoj de la Ŝtatoj-Membroj (nun 72), respondecaj al siaj registaroj. La aliaj du organoj, la Plenum-Komitato kaj la Sekretariato—dependas en la lasta linio de la Ĝenerala Konferenco, do denove de la Ŝtatoj-Membroj. Sekve, neniu organo de UNESKO povas en kiu ajn formo altrudi sian volon al la Ŝtatoj, kiuj ankaŭ sur tiu ĉi kampo de edukado, scienco kaj kulturo estas suverenaj. Tial, se iu ajn iam ajn flegis eĉ nur reveton, ke UNESKO povus, ekzemple, enkonduki la Internacian Lingvon en la lernejojn, tiu espero estis absolute malrealo, ĉar UNESKO tute simple ne havas tian povon. La Rezolucion, do, oni devas rigardi en tiu ĉi kadro de konstituciaj kaj faktaj eblecoj de UNESKO.

Ĝuste tial la Rezolucio havas unuarangan principan karakteron. Siatempe la Ligo de Nacioj estis akceptinta Raporton, en kiu ĉe la fino estis dirite, ke Esperanto “povus

iun tagon havi grandajn konsekvencojn el vidpunkto de la morala unueco de la mondo, se ĝia disvastiĝo ĝeneraliĝus”. La graveco de tiu dokumento estas senduba. Oni tamen ne povas ne noti la kondicionalan formon en kiu estas esprimita la penso. La ĵus akceptita Rezolucio de UNESKO ne esprimas sin en tia maniero. Ĝi ne parolas pri la eventualaj eblecoj por la estonteco, nek ĝi teoriumas pri la strukturo kiun devus aŭ ne devus havi la Internacia Lingvo. La Rezolucio tute simple implicite konsideras Esperanton kiel socian fakton kaj rekonas, ke la rezultoj *jam atingitaj* (ne atingotaj) per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj proksimigo de la popoloj, respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO.

La ŝlosilo por korekte taksi la unikan valoron kaj grandan atingopovon de la Rezolucio, troviĝas ĝuste en tiuj kvin vortoj: “celoj kaj idealoj de UNESKO”. Jen nur kelkaj el tiuj celoj kaj idealoj, fiksitaj en la Konstitucia Akto kaj Baza Programo de UNESKO: Defendo de la paco per pli bona kompreniĝo inter la popoloj kaj per la respektado de la homaj rajtoj; disvastigo de la kulturo kaj edukado; intelekta kaj morala solidareco de la homaro; interŝanĝo de ideoj, scioj kaj personoj; internacia kooperado sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo; venkado de malfacilaĵoj, kiujn kreas la diverseco de lingvoj; antaŭenigo

de edukado al monda civitaneco ; diskonigo de klasikaj kaj nuntempaj verkoj per tradukoj ; diskonigo de sciencaj scioj ; normigo de teknikaj terminologioj ; faciligo de libera disvastigo de ideoj skribe, parole kaj bilde . . .

La Rezolucio, en la 2 unuaj punktoj, signifas, do, oficialan rekonon de la supera internacia instanco por la edukado, scienco kaj kulturo, ke la rezultoj atingitaj per Esperanto kontribuis kaj kontribuas al la realigo de ĉiuj menciitaj esencaj kondiĉoj kondukantaj al unueco de la homaro kun samtempa respekto de la diferencoj. La punktoj 3 kaj 4 de la Rezolucio estas nur logika sekvo de la principa rekono, entenita en la du unuaj punktoj.

Per la Rezolucio de la 10-a de Decembro estas por la unua fojo oficiale agnoskita la eduka, scienca kaj kultura valoro de la Internacia Lingvo. En tio konsistas ĝia historia, epokfaranta signifo.

La konsultaj aranĝoj

La fakto, ke UEA ekde la 8-a de Decembro posedas konsultajn aranĝojn (angle: consultative arrangements), havas jenajn sekvojn :

UEA rajtas sen speciala invito sendi observanton al ĉiu sesio de la Ĝenerala Konferenco. Ĝi povas esti invitita sendi siajn specialistojn al kunvenoj, teknikaj konferencoj aŭ seminarioj rilatantaj al la demandoj, kiuj ĝin interesas. Laŭ la cirkonstancoj UEA povos sendi al tiaj kunvenoj kaj konferencoj sian opinion ankaŭ skribe. Tiucele UEA devos ĝustatempe informi la Ĝeneralan Direktoron pri tiu parto de la UNESKO-programo, kiu speciale interesas ĝin. UEA povas esti invitita

de la Ĝenerala Direktoro kooperadi kun UNESKO en la preparado kaj efektivigo de iuj projektoj. Nia Asocio ricevos estontece ĉiujn dokumentojn kaj nekonfidencajn informojn de UNESKO. La konsultaj aranĝoj plue rajtigas sendi skribajn raportojn kaj sugestojn pri la programo de UNESKO kaj la Ĝenerala Direktoro diskonigos tion al la membroj de la Plenum-Komitato, al la Ŝtatoj-Membroj kaj al la Ĝenerala Konferenco. Pere de sia observanto, UEA havos en la estonteco aŭtomate la rajton prezenti sian vidpunkton en diversaj komisionoj, komitatoj kaj helporganoj de la Ĝenerala Konferenco. Ĉiuj ĉi rajtoj kaj privilegioj povas resumiĝi je la fundamenta, nome la rajto esti konsultata en ĉiuj aferoj koncernantaj la kompetentecon kaj sferon de aktiveco de UEA. Praktike tio signifas la rajton doni sian opinion pri ĉio, kio koncernas la lingvan demandon en internaciaj rilatoj.

Siavice, asocio kun konsultaj aranĝoj devas helpi laŭ siaj eblecoj la efektivigon de la programo de UNESKO ; inviti tiun organizaĵon sendi sian observanton al la kongresoj kaj konferencoj de la asocio ; liveri al UNESKO informojn pri siaj aktivecoj kaj sendi al ĝi siajn publikaĵojn kaj periodaĵojn ; informadi UNESKO-n pri ĉiuj ŝanĝoj de la nombro de la membroj kaj de la diversaj funkciuloj ; sendi al UNESKO ĉiujare raporton pri la menciitaj punktoj.

La pozicio de "konsultaj aranĝoj" prezentas firman bazon por plej intima kunlaborado inter UNESKO kaj UEA. Laŭ mia opinio, estas minimume dudeko da diversaj fakoj, en kiuj UEA povas sukcese kunlabori kun UNESKO en la intereso de la

Unesko Rekonis la Valoron de Esperanto por la Edukado, Scienco kaj Kulturo

En la Januara numero de "Esperanto" aperis la teksto de la Rezolucio, kiun akceptis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en la lasta kunsido de la Pleno, la 10-an de Decembro 1954. En tiu ĉi numero de nia revuo ni publikigas la originalajn hispanan, anglan kaj francan tekstojn, kaj la Esperantan tradukon el la hispana originalo. Por doni almenaŭ palan bildon pri la multflankaj klopodoj, kiuj fine kondukis al tiu historia decido de la plej grava interŝtata organizacio por la scienco, edukado kaj kulturo, mi opinias ke estas utile prezenti, eĉ se nur en tre

antaŭenigo de ĝiaj celoj kaj idealoj, kiuj samtempe estas celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado.

* * *

Ambaŭ decidoj de UNESKO signifas historian mejloŝtonon en la evoluo kaj progresado de la Internacia Lingvo. Ili signas komenciĝon de esence nova epoko: tiu de oficiala rekono. Sur la bazo de la du decidoj la Esperanto-Movado povos disvolvi sennombrajn aktivecojn, kiuj, iom post iom—realisme planataj kaj organizite gvidataj—devas konduki al la fina venko: la uzado de la Internacia Lingvo sur ĉiuj kampoj de la internacia vivo. Dependas de ni mem, nur de ni, ĉu la Esperanto-Movado scios firme iri sur tiu vojo.

I.L.

mallonga formo, kelkajn esencajn faktojn kaj koncize interpreti la okazaĵojn. Tiamaniere ne nur pli klare vidiĝos la eksterordinara graveco de la UNESKO-Rezolucio, sed tio samtempe povos servi kiel bona instruo pri la labormetodoj aplikotaj, ankaŭ en la estonteco, por atingi pozitivan rezulton.

La Pariza Rezolucio

Kiel oni scias, la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Parizo en Nov./Dec. 1952, akceptis Rezolucion, laŭ kiu ĝi ŝargis la Ĝeneralan Direktoron komuniki la konatan Peticion al la Ŝtatoj-Membroj kaj entrepreni, konforme al la komentoj ricevotaj de tiuj Ŝtatoj, la necesan preparlaboron por ebligi al la Oka Sesio en Montevideo decidi pri la agoj farotaj je tiu ĉi Peticio. Detalojn pri la menciita Rezolucio, tute speciale pri ĝia signifo por la plua evoluo de la afero antaŭ UNESKO, oni trovos en la revuo "Esperanto", Januaro 1953 pp. 2-12. Ĉi tie estas necese akcenti jenon:

La originala svisa projekto de Rezolucio antaŭvidis, ke la Sekretariato de UNESKO entreprenos mem la esplorojn por prezenti al la Oka Sesio la necesan dokumentaron, kiu ebligos al la Ĝenerala Konferenco fari ian decidon. Surbaze de propono de la brita delegacio, tiu originala teksto estis tiel amendita, ke en ĝin eniris la vortoj "konforme al komentoj ricevotaj" de la Ŝtatoj-Membroj. La diferenco inter la du tekstoj—la

originala kaj la amendita — estas grandega. Laŭ la unua, la tuta afero estis troviĝonta en la manoj de la Sekretariato, kiu, estante internacia laŭ sia karaktero, estus povinta apliki al la studo internaciajn metodojn, universalajn mezurilojn kaj prijuĝon el monda vidpunkto. Laŭ la dua, fine akceptita de la Konferenco, la demando fakte venis en la manojn de la Ŝtatoj-Membroj, kiuj, evidente, ne povis kaj ne povas leviĝi al internacia nivelo, sed nepre devas esti limigitaj al mallarĝe naciaj perspektivoj. La akceptita teksto de la Pariza Rezolucio signifis, do, konsiderindan malbonigon de la pozicio kompare kun tiu, kiu sekvis el la originala svisa propono. Pri tio mi atentigis la plej intimajn tiamajn kunlaborantojn tiun saman tagon, kiam mi eksciis pri la amendo, nome kelkajn tagojn post la finiĝo de la Pariza Konferenco, kiun mi bedaŭrinde estis devigita forlasi post la akcepto de la svisa propono en la Laborgrupo pri Kulturaj Aktivecoj, sed antaŭ la propono de la amendo en la Programkomisiono. Tiam, kompreneble, nenio plu estis ŝanĝebla. Sekve, estis necese plani la tutan laboron sur la bazo de tiu akceptita teksto.

Ekde tiu momento estis klare, ke la aktivecoj devas esti organizitaj tiel, ke, unuflanke, la Sekretariato de UNESKO ricevu kiel eble plej ampleksan objektivan dokumentaron pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj en la internacia vivo, sed ke, aliflanke, la unuopaj Ŝtatoj-Membroj ricevu same tiel abundan kaj objektivan materialon, montrantan la valoron de Esperanto el vidpunkto de korekte komprenataj naciaj kulturaj interesoj. La laboro do, estis ruliĝonta sur du paralelaj relparoj kaj laŭ tri nete difinitaj

stadioj: (1) de Januaro 1953 ĝis la publikigo de la Raporto de la UNESKO-Sekretariato pri la respondoj de la Ŝtatoj-Membroj; (2) inter la publikigo de la menciita raporto ĝis la komenciĝo de la Konferenco en Montevideo; (3) dum la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO. Estas ankoraŭ menciinde, ke—pro la fakto, ke UNESKO disponis nek pri specialistoj nek pri financaj rimedoj por esplori sur kontentiga scienca nivelo la tutan demandon—la tasko entrepreni la studojn, havigi la dokumentojn kaj disponigi la kolektitan materialon al diversaj instancoj de UNESKO kaj de la Ŝtatoj-Membroj, devis esti plenumita de kompetenta scienca instanco de la Esperanto-Movado. Ĝin ricevis la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj ĝiaj kunlaborantoj en diversaj landoj.

La Laboro en la Unua Stadio

La 9-an de Februaro 1953 la Ĝenerala Direktoro de UNESKO sendis al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj cirkuleran leteron CL/720, en kiu li informis pri la decido de la Pariza Konferenco koncerne la Peticion kaj petis pri komentoj. La 10-an de Februaro 1953, C.E.D. dissendis al ĉiuj landaj asocioj kaj al ĉiuj kunlaborantoj en la UNESKO-afero la dokumenton CED/Int./1 sub la titolo “*Sugestoj koncerne kunmetadon de raportoj pri Esperanto*”. En tiu dokumento estis mallonge prezentita la signifo de la Pariza Rezolucio kaj estis donitaj detalaj konsiloj pri la maniero, laŭ kiu la diversaj kunlaborantoj kunmetu la raportojn pri Esperanto al siaj naciaj kompetentaj instancoj. Surbaze de tiu dokumento, kiel ankaŭ de persona korespondado

inter CED kaj la kunlaborantoj en diversaj landoj—nomitaj aŭ de la landaj asocioj interkonsente kun CED aŭ de CED rekte, se en la koncerna lando ne ekzistis Esperanto-Asocio — estis kunmetitaj multaj *raportoj pri la Esperanto-Movado el vidpunkto de la koncernaj landoj* kaj transdonitaj al la landaj UNESKO-Komisionoj, al la Ministerioj pri Edukado kaj al aliaj instancoj. Tiajn raportojn, ĝenerale tre bonajn kaj kompletajn, faris la kunlaborantoj por jenaj landoj: Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Svislando, Urugvajo, Usono. Kelkaj el la raportoj estis presitaj. Aliaj estis tre bele multobligitaj kun presitaj kovriloj. Fakte, la menciitaj raportoj en la pliparto de landoj servis ne nur por informi la UNESKO-instancojn pri la Internacia Lingvo, sed ili estis kaj ankoraŭ estas utiligataj ankaŭ por informado al pli vasta publiko, precipe al intelektulaj medioj. Krome, la raportoj—kiuj ampleksas kune plurajn centojn da paĝoj—prezentas riĉegan materialon pri la historio, evoluo kaj nuna stato de la Internacia Lingvo en la koncernaj landoj. Po unu ekzemplero de la raportoj estis sendita ankaŭ al la Sekretariato de UNESKO kune kun la respondoj de la Ŝtatoj-Membroj.

Siaflanke la Centro de Esploro kaj Dokumentado faris *specialan raporton* pri la Esperanto-Movado en la tuta mondo. La raporto donas koncizan bildon pri ĉio, kio estis kreita en Esperanto kaj pere de ĝi dum ĝia 66-jara ekzistado. Ĝi havas 50 dense tajpitajn paĝojn kaj pli ol 200 paĝojn da aldonaj dokumentoj kaj statistikaj tabeloj (detalojn vidu en la revuo

“Esperanto” Januaro 1954, p. 7). La 21-an de Novembro 1953 la raporto estis sendita al la Sekretariato de UNESKO en Parizo kaj ĝi estis, poste, parte utiligita por kunmeto de la Raporto de la Sekretariato al la Ĝenerala Konferenco en Montevideo. Dum pluraj *konferencoj* kun la funkciuloj de la Sekretariato en Parizo—precipe dum la konferencoj de la 18-a, 19-a kaj 29-a de Januaro 1954—mi havis la okazon ankaŭ buŝe priparoli multajn punktojn kaj doni kompletigajn informojn. Superflue diri, ka la *korespondado* inter CED kaj la Sekretariato estis konstanta kaj tre vigla.

Oni devas ne forgesi, ke ĉiuj naciaj UNESKO-Komisionoj en la mondo regule ricevadis (kaj ricevados ankaŭ estontece) la *dokumentojn, kiujn eldonas CED en la kadro de siaj normalaj aktivecoj*. Per cirkulera letero de la 24-a de Marto 1954 CED speciale atentigis la UNESKO-Komisionojn pri la graveco de tiuj dokumentoj kaj petis, ke ili estu disponigitaj al la delegitoj ĉe la UNESKO-Konferenco en Montevideo.

Konscia, ke la plej impona kaj plej efika dokumento pri la kultura signifo de Esperanto estas la Esperanta literaturo, CED ekde la komenco planis organizon de *granda ekspozicio en Montevideo* dum la Konferenco mem. Estas interese, ke al la sama ideo venis preskaŭ samtempe la esperantistoj de Urugvajo: mia letero al Prof. Fernandez Menéndez kaj lia letero al mi pri la sama temo kruciĝis survoje. Baldaŭ formiĝis en Montevideo la organiza komitato de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto. La 5-an de Decembro CED sendis al ĉiuj landaj asocioj, internaciaj Esperanto-organizaĵoj, Esperanto-eldonejoj kaj redakcioj de



La Instituto "José Batle y Ordóñez" en Avenida Agriciada 2025 en Montevideo, kie okazis la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto.

gazetoj kaj revuoj cirkuleran leteron kun la peto sendi unuarangan ekspozician materialon al Montevideo. Al la cirkulero estis aldonita detala plano de la estonta ekspozicio kun precizaj indikoj pri la fakoj, kiujn ĝi havos. Poste aperis en nia oficiala organo pluraj aliaj alvokoj pri alsendo de la materialo al Montevideo. El ĉiuj partoj de la mondo komencis kolektiĝi libroj, broŝuroj, gazetoj, revuoj, vortaroj, gvidlibroj kaj prospektoj, afiŝoj kaj reklamoj, nacilingva literaturo pri Esperanto... en Calle Yaguarón 1397, ĉe la kasisto de la Organiza Komitato, S-ro Rodolfo García. La cirkulero de la 5-a de Decembro finiĝis per la vortoj: "Per komunaj fortoj ni povas organizi en

Montevideo tian ekspozicion, kia neniam estis aranĝita en la historio de nia movado. Konsiderante la celon de la ekspozicio mi opinias, ke ĝi devas esti aŭ vere impona, aŭ tute ne okazi. Helpu, ke ĝi estu impona!" La peto vere ne restis seneŝa . . .

Aliagrava paŝo en la unua stadio estis letero de la 27-a de Junio 1953, per kiu U.E.A. petis de UNESKO la pozicion de *konsulta asocio* kaj tiucele aldonis la necesan dokumentaron.

Fine, estas menciinde, ke la Fakoj pri Eksteraj Rilatoj de UEA invitis UNESKO-n sendi *observanton* al la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb. Fakte, sinjoro Pierre Lebar ĉeestis tiun kongreson en la nomo de UNESKO.

Paralele kun la priskribitaj ĉefaktivecoj evoluis la aktiveco sur la kampo de *informado al la larĝa publiko*. La Informa Fakto de UEA pere de la Bulteno de la Gazetara Servo kaj precipe per sendado de modelaj artikoloj al la kunlaborantoj en diversaj landoj sukcesis aperigi en gazetoj kaj revuoj de la tuta mondo pli ol 1500 artikolojn kaj informojn nur pri la pritrakto de Esperanto fare de UNESKO (detaloj en Esperanto, Julio/Aŭg. 1954, p. 201).

Kompreneble, por sukcese plenumi la laboron en tiu ĉi tuta afero, sed tute speciale por digne aranĝi la ekspozicion, eldoni en taŭga formo ĉiujn necesajn publikaĵojn kaj reprezentigi dum la konferenco en Montevideo, estis necesaj almenaŭ minimumaj financaj rimedoj. Tiucele estis ĝustatempe starigita la Fondaĵo Montevideo. La prezidanto de UEA, S-ro E. Malmgren, en speciala artikolo atentigis pri la graveco de la Fondaĵo kaj petis la esperantistaron kontribui per donacoj. La rezulto estis, ke en kelkaj monatoj ni sukcesis kolekti konsiderindan sumon, kiu grandparte ebligis la realigon kaj eĉ larĝigon de la fiksita plano.

La Dokumento 8C/PRG/3 kaj la Klopodoj en la Dua Stadjo

La 1-an de Junio 1954 la Sekretariato de UNESKO, publikigis la "*Raporton pri la Internacia Peticio favore al Esperanto*" 8C/PRG/3 en la lingvoj angla, franca kaj hispana. La 17-paĝa Raporto entenas, interalie, resumon de la respondoj, kiujn donis la Ŝtatoj-Membroj al la Sekretariato. Naŭ ŝtatoj deklaris, ke ili ne deziras preni pozicion rilate la Peticion: Aŭstralio, Irano, Jordanio, Laoso, Monako, Nov-Zelando, Pakistano,

Dominikana Respubliko, Urugvajo. Deknaŭ ŝtatoj esprimis sin kontraŭ tio, ke UNESKO donu ian ajn favoran sekvon al la Peticio. Naŭ el tiuj ŝtatoj opiniis nedezirinda ĉian ajn kuraĝigon de la Internacia Lingvo. Tiuj ŝtatoj estis: Germanujo, Cejlono, Danlando, Nederlando, Filipinoj, Svedlando, Siamo, Sud-Afriko kaj Viet-Namo. Dek ŝtatoj esprimis sin favore: Aŭstrujo, Kamboĝo, Kubo, Hispanujo, Gvatemalo, Honduraso, Libano, Meksikio, Norvegujo kaj Jugoslavio. La plej favoraj respondoj estis tiuj de Aŭstrujo, Norvegujo kaj Honduraso, kiuj deklaris sin pretaj enkonduki la lingvon en la lernejojn sub certaj kondiĉoj. Tre malfavora estis la respondo de Usono. La Raporto de la Sekretariato enhavas, plue, tripaĝan aldonon pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-Movado kaj, fine, partojn de la Rezolucio akceptita de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb.

Jam antaŭ tio estis decidite, ke la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem pritraktos en du ĝeneralaj kunsidoj la temon "*La Internacia Lingvo antaŭ UNESKO*". Por ke la diskutoj estu fruktodonaj, estis necese fari ampleksajn preparojn precipe kun la celo kolekti opiniojn de edukaj kaj sciencaj institucioj, kiel ankaŭ de elstaraj personoj de la politika kaj ĝenerale publika vivo el diversaj landoj pri la kultura kaj politika aspektoj de la diskutota temo. CED sendis al la landaj asocioj la 6-an de Marto 1954 cirkuleron kun konsiloj pri la maniero fari la *enketon* kaj kun la precizaj demandoj al la enketotaj institucioj kaj unuopaj personoj. La enketo, farita en Nederlando, Italujo, Jugoslavio, Sarlando kaj Francando,

montris la pozicion de Esperanto en la publika opinio de kelkaj landoj. Siavice, la enketo—sur precipe alta nivelo en Nederlando, Italujo kaj Jugoslavio—pretere servis kiel tre taŭga instrumento de informado en la suproj de la kulturo kaj politiko de la koncernaj landoj. La abundaj informoj, havigitaj pere de la enketo, ebligis al la Kongreso en Haarlem pritrakti multe pli profunde la temon de la du ĝeneralaj kunsidoj kaj speciale la karakteron de la dokumento 8C/PRG/3. Montriĝis, ke la dokumento 8C/PRG/3 postulas plurajn korektojn kaj kompletigojn. Tial la Kongreso ĉiuvoĉe akceptis *Memorandon*, kiu poste estis transdonita al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO (la tekston de la Memorando en Esperanto vidu en la revuo "La Praktiko" Nov. 1954, p. 159). La Kongreso, krome, ĉiuvoĉe akceptis mallongan *Rezolucion*, per kiu ĝi petis ĉiujn registarojn de la Ŝtatoj-Membroj doni sian apogon al la Peticio. Pere de la kunlaborantoj de CED la Rezolucio estis sendita, en la respektivaj naciaj lingvoj, al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj de UNESKO (la tekston de la Rezolucio vidu en "Esperanto" Sept. 1954, p. 236). La Memorando estis publikigita de la Sekretariato de UNESKO en la lingvoj angla, franca kaj hispana kiel *dokumento 8C/PRG/3 Add.*

Jam la 20-an de Februaro 1954 mi dissendis al ĉiuj kunlaborantoj la cirkuleron UNESKO-Petskribo/2, en kiu estis priskribita la tiama situacio kaj estis farita sugesto pri *teksto de rezolucio*, kiun, laŭ mia opinio, povus akcepti la Ĝenerala Konferenco en Montevideo, se la delegacioj estos objektive informitaj kaj se troviĝos almenaŭ unu delegacio kiu faros la *proponon*. Post pluraj aliaj cirkuleroj

kaj interŝanĝo de multaj leteroj kun la kunlaborantoj en la UNESKO-afero, fine, la 30-an de Aŭgusto 1954 (cirkulero UNESKO-Petskribo/6) mi faris la lastan alvokon en tiu afero kaj speciale atentigis pri la konsekvencoj, se neniu delegacio proponos rezolucion al la Ĝenerala Konferenco. Malgraŭ la klopodoj de pluraj kunlaborantoj, tamen neniuj el la registaroj decidiĝis fari ian konkretan proponon de rezolucio rilate la Peticion. Tiu stato restis neŝanĝita ĝis la tago de la komenciĝo de la Konferenco.

Kelkajn tagojn antaŭ la forveturo el Londono estis finpretigita la *dokumento CED/4* sub la titolo "*La Internacia Lingvo kaj la kontribuo de la Esperanto-Movado al la celoj de UNESKO*". La dokumento havas jenajn ĉapitrojn: Kelkaj pensoj pri komuna lingvo; Enkonduko; Celoj de UNESKO kaj de la Esperanto-Movado; La Internacia Lingvo; Edukado; La Esperanto-Organizaĵoj kaj la internacia kompreniĝo; Interŝanĝo de personoj; Literaturo; Scienco kaj Tekniko; Teknikaj terminaroj; Disvastigo de informoj; Nombro de Esperanto-publikaĵoj; Konkludo. Al la dokumento estas aldonita la Rezolucio de la 39-a U.K. Ĉiu ĉapitro komenciĝas per citaĵo el la Konstitucio de UNESKO aŭ el ĝia Baza Programo kaj poste sekvas la kontribuo de la Esperanto-Movado al ĉiu el tiuj specialaj taskoj de UNESKO. La dokumento estas eldonita en multobligita formo, kun presitaj kovriloj, en la franca lingvo en 400 ekzempleroj, en la angla en 500 ekzempleroj, dum en la hispana ĝi estas publikigita en 5000 ekzempleroj presitaj sur luksa papero.

Deko da aliaj malpli gravaj taskoj estis sukcese solvitaj en la lastaj semajnoj antaŭ la forveturo: fin-

preparoj por la ekspozicio, rajtigo al UEA sendi observanton al la Konferenco, kolekto kaj ordigo de plej diversaj dokumentoj por ĉiu eventualaĵo, dissendo al la landaj informaj fakoj de kelkaj freŝdataj sciigoj kaj de tri artikoloj aperigotaj en la nacilingva gazetaro, last-momentaj informoj kaj konsiloj en korespondadokunlakunlaborantoj... La lastan leteron mi diktis la 13-an de Oktobro je la 12-a horo. Je la 14.30 la vagonaro forveturis el Londono kaj la saman tagon mi enŝipiĝis en "Alcantara", kiu la morgaŭan matenon forlasis Southampton. Komenciĝis la vojaĝo al la tria, decida stadio : la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo !

La Unuaj Kontaktoj

Dum la dekok-taga vojaĝo sur la ŝipo mi havis la okazon ne nur iom ripozi post la tre streĉaj laboroj de la lastaj semajnoj, sed ankaŭ trankvile studi ĉiujn dokumentojn, kiujn eldonis UNESKO okaze de la Montevidea Sesio. Krome, mi havis la bonan ŝancon konversacii plurfoje kun kelkaj britaj reprezentantoj, kiuj kunveturis.

En Montevideo mi alveturis la 1-an de Novembro, la saman tagon kiam la Plenumkonitato de UNESKO komencis siajn kunsidojn. Atendis min la reprezentantoj de la Urugvaja Esperanto Societo, Prof. M. Fernandez Menéndez, D-ro R. Zeballos Morares, S-ro Barbieri kaj aliaj, kun kiuj en la sekvantaj tagoj kaj semajnoj mi estis



Prof. Ivo Lapenna kun la membroj de la Organiza Komitato de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto. De maldekstre : S-ro Garcia, F-ino Cao, S-ro Berger, Prof. Fernandez Menéndez, Prof. Lapenna, F-ino Nilda, Prof. V. L. Cao, D-ro Zeballes, F-ino Zylber, S-ro Klein.



*Prof. Manuel
Fernandez
Menéndez
malfermas
la
Ekspozicion.*

travivonta, en ĉiam pli intima kunlaborado kaj pli forta amikeco, ĉiujn ĝojojn kaj malĝojojn, ekscitiĝojn, koleron kaj feliĉon, kaŭzitajn de la dramecaj turniĝoj en diversaj organoj de la Ĝenerala Konferenco.

La laboro komenciĝis ekde la unua momento. Oni devis venki ankaŭ multajn malfacilaĵojn pure teknikajn. En tiuj tagoj en Montevideo estis striko de kompostistoj kaj ni devis presigi ne nur la dokumenton CED/4 en la hispana lingvo, sed ankaŭ la prospekton pri la ekspozicio, diversajn invitilojn kaj aliajn presaĵojn. Feliĉe,

dank'al la bonaj rilatoj de S-ro García en la presistaj medioj, ĉio estis ĝustatempe finita. Eĉ UNESKO ne povis en la unuaj tagoj solvi kontentige tiun demandon koncerne siajn publikaĵojn! Plue, oni devis tute rearanĝi la ekspozician salonon, instalii specialan elektran lumon, klasigi la abundegan ekspozician materialon, munti la tutan ekspozicion kaj prizorgi mil detalojn, por ke ĝi fakte respondu ankaŭ el vidpunkto de la arta gusto kaj forma aranĝo al sia nomo: *Unua Universala Ekspozicio de Esperanto*.

Ĉiuvespere ni kunvenadis en la hejmo de la kasisto de la Organiza Komitato, S-ro R. García, kaj la morgaŭan tagon ni ĉiuj laboris en la ekspoziciejo por realigi la decidojn de la antaŭa vespero. Oni ŝvitis kaj oni havis malpurajn manojn. Oni ankaŭ ekscitiĝis kaj iom koleris pro tiu “mañana”, tiel karakteriza por tiu ĉarma lando (“mañana”=morgaŭ estas la unua vorto, kiun mi ellernis en Urugvajo !)

La unua plano estis inaŭguri la ekspozicion la 16-an de Novembro.

dankis al la Organiza Komitato kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis per alsendo de materialo por la ekspozicio. Speciale mi dankis al la Prezidanto de la Nacia Konsilantaro, al la Ministro de Edukado kaj al la Urbestro de Montevideo pro la helpo, kiun ili donis al la Organiza Komitato. Estas menciinde, ke entute pli ol cent plej elstaraj personecoj de la Urugvaja politika kaj kultura vivo estis membroj de la Patrona Komitato de la ekspozicio. Ili ĉiuj, kiel ankaŭ ĉiuj 72 delegacioj ĉe la Konferenco,



Al la invititoj ĉe la inaŭguro de la Ekspozicio oni prezentis honoran vinon. En la mezo—inter D-ro Pfeffer (maldekstre) kaj Prof. Lapenna troviĝas Prof. J. Thomas kaj S-ro L. Elvin, Direktoroj de departementoj de UNESKO.

Fakte ĝi estis brile inaŭgurita la “mañana” de tiu tago, nome la 17-an de Novembro, je la 19.30 vespere. Prof. M. Fernandez Menéndez faris tre belan paroladon en la hispana lingvo. Li eksplikis la celon de la ekspozicio kaj forte akcentis la kulturajn valorojn kreitajn en la Internacia Lingvo. Poste salutis en Esperanto S-ino Datoe Toemenggoeng, kiu alflugis al Montevideo nur por ĉeesti la inaŭguron de la ekspozicio. Ŝi parolis kiel prezidantino de la Indonezia Esperanto-Asocio kaj substrekkis la valoron de Esperanto por la aziaj popoloj. Fine, mi mem faris mallongan paroladeton, per kiu mi

ĉiuj oficistoj de UNESKO, ĉiuj lernejoj kaj kulturaj institucioj de Montevideo ricevis specialajn invitojn vizitila ekspozicion. Nur 200 el ili estis invitetaj ĉeesti la inaŭguran feston de la 17-a de Novembro. La larĝa publiko estis atentigita per 2000 grandaj afiŝoj, ĉirkaŭ 3000 malgrandaj kaj multaj anoncoj en la gazetoj kaj per radio. Pri la ekspozicio oni legu apartan artikolon en tiu ĉi numero de nia revuo.

La gazetaro de Montevideo en pluraj okazoj skribis pri Esperanto : pri mia alveno ; poste, okaze de la preskonferenco de la 15-a de Novembro ; plue, okaze de la inaŭguro de la



La inaŭguro de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto. Dum la kantado de la "Espero" ĉiuj staris. En la unua vico de dekstre S-ro L. Elvin, Direktoro de la Eduka Departemento de UNESKO, kaj Prof. J. Thomas, Direktoro de la Kulturaj Aktivecoj.

ekspozicio. En la gazetaro aperis ankaŭ pluraj informoj kaj artikoloj pri la Peticio. Tre fortan apogon donis la demokrata urugvaja gazetaro inter la 4-a kaj 10-a de Decembro, kiam ĝi mobilizis la publikan opinion kontraŭ la nekulturaj atakoj de Prof. Blinkenberg en la Programkomisiono. Ankaŭ la *radio* interesiĝis: la unuan intervjuon mi havis la 15-an de Novembro, la lastan paroladeton mi faris la 7-an de Decembro.

En la unuaj tagoj de la Konferenco, kiu komenciĝis la 12-an de Novembro, mi disdonigis pere de la Sekretariato al ĉiuj delegacioj sufiĉan nombron da ekzempleroj de la *dokumento CED/4* en la lingvoj angla, franca kaj hispana. Jam antaŭ tio, la 13-an de Novembro, la Ĝenerala Konferenco ĉiuvoĉe allasis min kiel *observanton de*

UEA. Tiu decido estis farita laŭ la rekomendo de la Plenumkomitato de UNESKO. Ĝi estis necesa, ĉar en tiu momento UEA ankoraŭ ne havis la konsultajn aranĝojn, kiuj, interalie, rajtigas aŭtomate al reprezentiĝo ĉe la Ĝenerala Konferenco pere de observanto.

En la unuaj tagoj mi faris vizitojn al la Urugvajaj aŭtoritatoj, al la Episkopo de Montevideo S-ro Barbieri kaj mi havis plurajn konversaciojn kun la membroj de la Plenumkomitato de UNESKO.

La unua venko : UEA ricevas la Konsultan Aranĝon

Ŝajnas al mi ke estas necese atentigi ĉi tie, ke antaŭ la Ĝenerala Konferenco de UNESKO troviĝis du

nete sendependaj demandoj rilate Esperanton. Unu afero estas la Peticio, kaj tute alia estas la peto de UEA koncerne la konsultajn aranĝojn. La demando pri la konsultaj aranĝoj inter UEA kaj UNESKO estis pritraktota, ĉue, en la Plenumkomitato, poste en la Administra Komisiono de la Ĝenerala Konferenco kaj, fine, decidota en la Pleno de la Konferenco surbaze de pozitiva aŭ negativa rekomendo de la Administra Komisiono. Male, la Peticio estis pritraktota de la Programkomisiono, kies decidon—denove negativan aŭ pozitivan—estis aprobonta la Pleno de la Konferenco. Pretere mi diru, ke oni neniam precize scias la momenton kiam iu demando estos traktata en iu el la menciitaj organoj, ĉar ĉiu el ili rajtas ŝanĝi la tagordon kaj prokrasti iun punkton, aŭ preni en konsideron tuj iun demandon, kiu, laŭ la tagordo, devus esti decidita nur poste. Ĉar la du grandaj komisionoj—la Administra kaj la Programa—laboris samtempe, estis necese senĉese, plurfoje en la tago, kelkfoje eĉ plurfoje dum unu horo iri de unu salono al la alia por povi sekvi la debatojn. Samtempe mi devis, kompreneble, utiligi ĉiun okazon por konversacioj kun diversaj delegitoj en la apudaj salonoj kaj ĉambroj de la konferencejo. Iom nervostreĉe.

La Plenumkomitato pritraktis la demandon pri la konsultaj aranĝoj la 5-an de Novembro en la kunsido de la mateno. Du el la membroj—la Dano Prof. Nielsen kaj la Sviso S-ro Barbey—forte kontraŭstaris la peton de UEA. Ĝin apogis la Italo Prof. Veronese kaj la Franco Prof. Laugier. Ĉar mi sciis de la antaŭaj konversacioj kun la diversaj membroj de la Plenumkomitato, ke ili favoras la peton, mi ne petis la parolon dum tiu

kunsido. Per ĉiuj voĉoj kontraŭ du la Plenumkomitato decidis rekomendi UEA al konsultaj aranĝoj. La Administra Komisiono diskutis pri la demando la 25-an de Novembro kaj ĉiuvoĉe decidis konsenti al UEA la konsultajn aranĝojn. Post tiu decido mi ne plu devis rapidi de salono al salono, sed mi povis koncentrigi mian aktivecon nur al la Programkomisiono. Mi aldonu, ke la 8-an de Decembro la Pleno de la Ĝenerala Konferenco, aprobante ĉiuvoĉe la Raporton de la Administra Komisiono, aprobis samtempe ĝian decidon koncerne la konsultajn aranĝojn. Tiamaniere establiĝis daŭraj, firmaj rilatoj inter UNESKO kaj UEA. Pri la signifo de tiu decido ni aperigas apartan artikolon sur la paĝo 35 de tiu ĉi numero.

Malfacilaĵoj ĉirkaŭ la Peticio

Kiel dirite supre, ĝis la momento de la komenciĝo de la Konferenco, neniu registaro instrukiis sian delegacion fari ian ajn proponon de rezolucio rilate la Peticion. Je dispono de la Konferenco troviĝis la menciitaj dokumentoj 8C/PRG/3 kaj 8C/PRG/3 Add., eldonitaj de la Sekretariato. Aliflanke, la delegitoj havis diversajn dokumentojn, publikigitajn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kaj ili povis, vizitante la ekspozicion je nuraj cent paŝoj de la konferencejo, persone konvinkiĝi pri la impona progreso, kiun faris la Internacia Lingvo en neplenaj sep jardekoj de sia vivo. Fakte, multaj delegitoj tralegis aŭ almenaŭ trafoliumis la raporton de CED pri la kontribuo de la Esperanto-Movado al la celoj de UNESKO. Pluraj delegacioj sendis siajn reprezentantojn al la inaŭguro de la ekspozicio kaj ankaŭ poste unuopaj delegitoj venadis al la

ekspozicio almenaŭ por momento. Al tiuj kaj al aliaj delegitoj, kun kiuj mi parolis pri la afero, mi donis ĉiujn petitajn informojn.

Mia ĉefa klopodo estis direktita al konvinko de almenaŭ unu delegacio pri la nepre neceso *proponi rezolucion* koncerne la Peticion. De tiu propono dependis ĉiu plia paŝo. Laŭ la Interna Regularo de la Ĝenerala Konferenco nenia decido povas esti farita pri kiu ajn punkto de la tagordo, sen ĝustatempe prezentita projekto de rezolucio fare de iu delegacio. Ĝuste tial mi siatempe, plurajn monatojn antaŭ la komenciĝo de la Konferenco, atentigis pri tio la kunlaborantojn en diversaj landoj kaj petis ilin instigi siajn respektivajn registarojn fari konkretan proponon en preskribita formo. Ni ne sukcesis trovi tian delegacion antaŭ la Konferenco. Mi ne sukcesis ĝin trovi dum la Konferenco ĝis preskaŭ la lasta momento. Mi havis sennombrajn konversaciojn. Pli ol 300 delegitoj, anstataŭantoj kaj sekretarioj de kvindeko da delegacioj estis kontaktitaj. Ne estas eble priskribi ĉi tie—eĉ ne partete kaj plej resume—la enhavon de ĉiuj ĉi konversacioj, diskutoj kaj kelkfoje eĉ disputoj. Por la legantoj de nia revuo sufiĉas, se mi diras, ke eĉ la delegacioj de kelkaj el la ŝtatoj, kiuj siatempe plej favore respondis al la Sekretariato, nun—verŝajne ŝancelitaj pro la nete negativa starpunkto de iuj grandaj potencoj—prenis pozicion malkonforman al la antaŭa. Ekzemple, la delegito de Aŭstrujo, S-ro Max Lowenthal-Chlumecky diris, ke li bone scias, ke la registaro de lia lando favoras nian aferon, sed ke li ricevis absolute neniajn instrukciojn pri ĝi. Tial la delegacio de Aŭstrujo—li daŭrigis — estas preta apogi kaj

voĉdoni por ĉiu ajn rezolucio favora al Esperanto, sed ne deziras mem proponi aŭ iniciati. La Prezidanto de la norvega delegacio, Prof. Sommerfelt, diris, ke la favora norvega raporto al la Sekretariato de UNESKO estis de la Ministerio pri Edukado, sed ke li havas aliajn instrukciojn de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj (ne estas mia afero interpreti ĉi tie tiujn strange kontraŭdirajn instrukciojn).

Estas interese rimarkigi, ke kelkaj delegitoj—precipe tiuj, kiuj legis la dokumentaron de CED kaj vizitis la ekspozicion—estis vere impresitaj de la rezultoj atingitaj en Esperanto kaj pere de ĝi. En privataj konversacioj ili deklaris sin tre simpatiaj al Esperanto, sed tamen ne deziris fari ian ajn proponon, ĉar aŭ ili havis kontraŭajn instrukciojn de siaj registaroj, aŭ tiaj instrukcioj mankis.

Estis en Montevideo ankoraŭ unu speco de delegitoj: tiuj, kiuj estas principaj malamikoj ne nur de Esperanto, sed eĉ de la ideo mem de komuna internacia lingvo. Iliaj scioj pri Esperanto kaj ĝenerale pri la lingva demando en internaciaj rilatoj estas nulaj, aŭ deformitaj de antaŭjuĝoj, profesia blinda malamo kaj la malproporcio inter la titoloj, kiujn ili portas, kaj la atingopovo de ilia intelekto. Tiu grupeto—feliĉe tre malgranda—kompreneble nek vizitis la ekspozicion, nek legis la dokumentan materialon disponigitan de CED. La karaktero de tiaspecaj homoj malebligas al ili ion ajn vidi aŭ aŭdi eĉ tiam, kiam ili rigardas aŭ aŭskultas. Tamen tiu grupeto faris ĉion eblan por malutili al la Internacia Lingvo kaj por malhelpi, ke la Ĝenerala Konferenco akceptu ian ajn favoran rezolucion pri Esperanto. Por krei konfuzon, iuj el tiuj delegitoj

ne hezitis utiligi diversajn forme belaspektajn, sed enhave pseŭdosciencajn broŝuretojn kaj folietojn, kiujn ambiciaj aŭtoroj de mortnaskitaj projektoj kaj projektetoj de komuna lingvo ankaŭ ĉifoje sendis al UNESKO kaj en abunda kvanto disponigis al tiuj delegitoj . . .

Intertempe la Programkomisiono laboris. Ĝi jam pritraktis la fakojn Edukado, Sciencoj Naturaj, Sciencoj Sociaj, sed ankoraŭ neniuj delegacio proponis projekton de rezolucio. La Programkomisiono komencis diskuti la fakon Kulturaj Aktivecoj, en kies kadro troviĝis la Peticio. De tago al tago, de horo al horo alproksimiĝis la momento, kiam en la Programkomisiono devos esti pritraktita la punkto 8.4.4.1., kiu havis la titolon "Internacia Peticio favore al Esperanto".

Estis jam la 2-a de Decembro. Tiun matenon la delegitino de Meksikio, S-ino Vallarta, petis min akompani ŝin al la ekspozicio. Ŝia entuziasmo kreskis de unu fako al la alia. Jam antaŭ tio ŝi estis profunde trastudinta la dokumenton CED/4. Ĉe la ekspozicio ŝi povis vidi grandan parton de tio, kion ŝi legis en la dokumento.

Nun la afero evoluis fulmorapide. Jam je la 13-a horo de la sama tago la *Meksikia Delegacio*, post mallonga kunsido, decidis proponi tre objektivan projekton de rezolucio. Je la 17-a horo la rezolucio jam estis multobligita en la laborlingvoj de UNESKO. Je la 18.30 mi estis akceptita de la urugvaja Ministro pri Edukado, kiu samtempe estis Prezidanto de la Urugvaja Delegacio kaj Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco. Post mallonga konversacio li promesis, ke Urugvajo apogos la rezolucion de Meksikio.

Ankaŭ la Prezidantoj aŭ iliaj anstataŭantoj de aliaj delegacioj, entute ĉirkaŭ 30, promesis apogon kaj subtenon. Dum tiu tuta tempo la Programkomisiono laboris. Tiun tagon ĝi rekomencis la kunsidon je la 9-a horo vespere kaj ĝi daŭrigis la laboron ĝis la 1.30 matene. Ĝuste kiam la Programkomisiono estis pritraktonta la Peticion, la Prezidanto interrompis la kunsidon.

La 3-an de Decembro la Programkomisiono okupiĝis pri pluraj aliaj, ĝis tiam ne solvitaj punktoj. La samon ĝi faris sabaton matene, la 4-an de Decembro. Nur en la malfrua posttagmezo la Programkomisiono revenis al la fako Kulturaj Aktivecoj kaj faris decidon pri la Peticio.

Hontinda Atako de Prof. Blinkenberg en la Programkomisiono

La sekretario de la Komisiono fine anoncis la punkton pri la Peticio. Estis normale ke post tio ricevu la parolon aŭ la delegito de Meksikio, aŭ mi kiel observanto de UEA, kiu, en tiu ĉi okazo reprezentis la subskribintojn de la Peticio. Mi levis la manon, sed subite, samtempe kun mi, petis la parolon la dana delegito Prof. Blinkenberg. La Prezidanto, S-ro Bourgeois (Sviso), donis la parolon al Prof. Blinkenberg kaj ne al mi, kvankam mi estis ne nur levinta la manon, sed ankaŭ anoncinta min plurajn tagojn antaŭe. Prof. Blinkenberg diris, ke li estas lingvisto kaj ke, en tiu kvalito, li asertas ke Esperanto tute ne estas internacia, ke ĝin "inventis" amatoro kaj ne lingvisto, ke Esperanto havas malriĉan vortaron kaj primitivan sintakson, ke en tiu lingvo oni eble povas esprimi la urugvajajn menuojn, sed ke ĝi ne povas servi por la

literaturo, nek entute por kulturaj celoj. Sian intervenon li faris en tre n serioza tono kun la celo provoki ridojn. Li spicis ĝin per kelkaj “spritaĵoj”, je kiuj povis reagi nur kompletaj ignorantoj, kies konoj pri la afero ne estis pli larĝaj nek pli profundaj ol tiuj de la “oratoro”. Similajn “spritaĵojn” mi jam antaŭ multaj jaroj aŭdis de du klaŭnoj en iu balkana vilaĝa cirko. Prof. Blinkenberg, do, eĉ originala ne estis. Sed ni provizore lasu lin. Ni ankoraŭ havos okazon reveni al li kaj precipe al liaj jam famaj “urugvajaj menuoj” alian fojon.

En la atmosfero de neseriozeco, kreita de Prof. Blinkenberg, mi ricevis la parolon. La Prezidanto permesis al mi paroli nur dum tri minutoj. Tiurilate li povis pravigi sin per decido de la Programkomisiono, farita antaŭ kelkaj tagoj, laŭ kiu neniu interveno povos daŭri pli ol tri minutojn. En la lasta momento, pro la atakoj de Prof. Blinkenberg, mi devis ŝanĝi la projektitan paroladeton. Mia celo estis, almenaŭ restarigi la atmosferon de kulturo kaj de digno. La tekston de mia interveno oni povas legi en tiu ĉi numero sur la paĝo 54.

Post mi, tre bone parolis la Urugvaja delegito Prof. Clemente Estable, kiu protestis kontraŭ la nedigna kaj malserioza interveno de Prof. Blinkenberg. Prof. Sommerfelt (Norvego) rekonis la disvastigitecon de Esperanto, deklaris, ke li povus voĉdoni pri ĉiuj punktoj de la Meksikia rezolucio, kiuj rilatas al la fakta stato, sed ke li tamen voĉdonos kontraŭ la rezolucio en la nuna formo. Tiam la Prezidanto voĉdonigis la rezolucion. La rezulto estis: tri delegacioj (Meksikio, Urugvajo, Ĉinuĵo) voĉdonis por la rezolucio, 23

estis kontraŭ, 19 sin detenis.

La Meksikia rezolucio, do, estis rifuzita. Mi estas certa ke voĉdonis kontraŭ: Svedujo, Norvegujo, Francujo, Belgujo, Danlando, Nederlando, Svislando, Usono, Britujo, Egiptujo, Kubo, Grekujo. Mi estas certa, ke sin detenis Sovet-Unio, Pollando, Bjelorusio, Ukrainio, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavio. Mi ne povas diri kiel voĉdonis la aliaj delegacioj. Estis tre malfacile kontroli, ĉar oni voĉdonas per levado de la manoj kaj tio daŭras nur kelkajn sekundojn. Nenie estas notataj la ŝtatoj, kiuj voĉdonas por aŭ kontraŭ iu propono, aŭ sin detenas, krom en okazoj de laŭnoma voĉdonado.

Ĉe la fino de tiu kunsido mi ankoraŭfoje parolis kaj insistis pri tio ke la Komisiono almenaŭ akceptu la Raporton 8C/PRG/3 de la Sekretariato. Mi havis specialajn kaŭzojn por postuli tion. Kontraŭis la dana delegito, Prof. Nielsen (Prof. Blinkenberg foriris post kiam li faris sian “laboron”), sed apogis min la delegito de Nov-Zelando D-ro Beeby. La Komisiono akceptis mian starpunkton kaj “prenis noton” pri tiu Raporto.

La malsukceso en la Programkomisiono ŝuldiĝas ĉefe al la atmosfero de neseriozeco intence provokita de la dana delegito. Li certe ne estus sukcesinta tiurilate, se la pli gravaj delegitoj de ĉiuj delegacioj estus ĉeestintaj tiun kunsidon. Bedaŭrinde en tiu malfrua horo de sabata posttagmezo multaj prezidantoj de delegacioj kaj pli influaj delegitoj—inter kiuj la pliparto de tiuj, kiuj intencis subteni la Meksikian rezolucion—ne ĉeestis. Troviĝis tie nur iliaj anstataŭantoj, kiuj ne estis informitaj pri la afero, aŭ havis nur

mankajn instrukciojn. Kelkaj delegacioj, ekzemple la aŭstra, entute ne ĉeestis la kunsidon. Ĉio ĉi estis tre bedaŭrinda, sed ĉio ĉi ne povis ŝanĝilarezulton de la voĉdono. La Programkomisiono rifuzis la Meksikian rezolucion kaj per tio la afero estis finita. Almenaŭ tiel ŝajnis, ĉar en la tuta historio de UNESKO neniam okazis, ke la Pleno rekonsideris kaj ŝanĝis decidon de kiu ajn el la grandaj komisionoj.

La Okazaĵoj inter la 4-a kaj 10-a de Decembro

Jen nun nur kelkaj momentaj bildetoj de la filmaj eventoj inter sabato, la 4-a de Decembro, kaj vendredo, la 10-a de Decembro:

Sabaton vespere ni kunvenis en la ekspoziciejo. Estis kunmetita *protesta letero de la Urugvaja Esperanto-Societo*. La saman vesperon Prof. L. Cao, la sekretario, tradukis ĝin en la hispanan kaj portis al la redakcioj de deko da gazetoj. La teksto de tiu letero troviĝas sur la paĝo 55 de tiu ĉi numero.

Lundon matene la Urugvaja Esperanto-Societo resendis al la Dana Konsulejo en Montevideo la *kulturan filmon pri Danlando*. La teksto de la koncerna akompana letero troviĝas sur la paĝo 56 de tiu ĉi numero.

Lundon matene ankaŭ aperis en la granda gazeto "*La Mañana*" tute mallonga informo, ke la Urugvaja Societo protestas kontraŭ la agordo en la Programkomisiono dum la voĉdonado. Tiu gazeto kaj ankaŭ la aliaj matenaj gazetoj raportis pri la malakcepto de la Meksikia rezolucio fare de la Programkomisiono.

Mardon la grava matena gazeto "*El Pais*" alportis preskaŭ la kompletan tekston de la Urugvaja

Societo. La saman tagon la granda gazeto "El Debate" publikigis la kompletan tekston, sed ne en formo de deklaro de la Urugvaja Societo. Ĝi tion faris en la propra nomo, do sen la subskriboj de Prof. Fernandez Menéndez kaj Prof. Cao. Simile agis ankaŭ alia granda gazeto, la "*Tribuna Popular*". Unu post la alia la gazetoj publikigis la tekston de la deklaro kaj tiamaniere objekte informis la publikon pri la nekultura kaj kontraŭscienca interveno de Prof. Blinkenberg. Tiun matenon mi faris paroladeton pere de unu el la *radio-stacioj* de Montevideo. Mi esprimis la kontentecon pro la decido de la Administra Komisiono koncerne la konsultajn aranĝojn, sed mi kritike parolis pri la decido de la Programkomisiono. La publika opinio de Urugvajo kaj precipe de Montevideo ekondiĝis. La konsciencoj vekigis. Ĉiuj simpatioj estis je la flanko de justeco, de kulturo, de Esperanto.

Merkredon pliaj gazetoj skribis pri la afero. Kiel en la antaŭaj tagoj, ankaŭ tiun matenon mi iris al la conferencejo. Kvankam fizike tre laca, ĉar mi dormis tre malmulte en la pasintaj noktoj, mi decidiĝis al plia paŝo. Antaŭ ol ĝin fari mi deziris informiĝi pri la situacio en la UNESKO-medioj. Mi konstatis, ke la grandiganta ondo de malkontento en la publika opinio de Urugvajo atingis la Konferencejon kaj kaŭzis unue konsterniĝon kaj poste konsciiĝon pri la graveco de la tuta afero, kiu minacis fariĝi monda kultura skandalo. Unu post la alia diversaj delegitoj kontaktis min por esprimi sian bedaŭron pro la sabataj okazaĵoj kaj por akcenti sian mal-solidariĝon kun la interveno de la dana delegito . . . Mi restis tie nur mallongan tempon kaj tiam rapidis

al la gastama hejmo de Prof. Cao, por ke li traduku en la hispanan lingvon mian *leteron al la Prezidanto de la Konferenco*. La letero estis transdonita al la Sekretariato de UNESKO en tri kopioj je la 5-a horo. Jam post unu horo ĝi estis tradukita en la francan kaj anglan de UNESKO mem. . . (La tekston de tiu letero vidu sur paĝo 57 de tiu ĉi numero). La nombro da personoj kiuj nun vizitis la ekspozicion konsiderinde pligrandiĝis kompare kun la antaŭaj tagoj. En UNESKO mi mem vidis multajn delegitojn atente legi la dokumenton CED/4. Pluraj delegitoj nur nun trovis la necesan tempon por viziti la ekspozicion !

En la nokto de merkredo al ĵaŭdo la menciita letero al la Prezidanto de la Konferenco estis multobligita kaj ĵaŭdon matene disdonita al ĉiuj delegacioj. La Esperanto-afero, kiel ĝi estis nomata en Montevideo, grandiĝis de tago al tago, de horo al horo. Ne nur en la medioj de UNESKO, ne nur en la intelektulaj rondoj de Montevideo, sed ankaŭ en la larĝaj popoltavoloj oni diskutis kaj parolis pri ĝi. En tiaj kondiĉoj mi decidiĝis al plia paŝo kaj per mallonga letero petis la Prezidentaron de la Konferenco la rajton *paroli en la Pleno* vendredon matene, kiam tiu organo estis akceptonta la Raporton de la Programkomisiono (la tekston de tiu letereto vidu sur paĝo 60).

Vendredon matene la sekretario de la Konferenco informis min, ke la Prezidentaro ne povis konsenti al mi la parolon en la Pleno, ĉar tio signifus danĝeran precedencon por la estonteco, sed ke, anstataŭe, akceptos min en la posttagmezo unu el la vic-prezidantoj de la Konferenco, la Prezidinto de la Programkomisiono kaj la Ĝenerala Direktoro, S-ro

Luther Evans. Tiun matenon la Pleno de la Konferenco ĉiuvoĉe akceptis la Raporton de la Programkomisiono. La raportisto diris eĉ ne unu vorton pri la rifuzo de la Meksikia rezolucio, sed li nur informis, ke la Programkomisiono "prenis noton" de la Raporto 8C/PRG/3.

La Triumfo de Esperanto

Je la 4-a horo posttagmeze mi estis akceptita de la tri reprezentantoj de UNESKO, S-roj L. H. Evans, L. Pin Malakul kaj Bourgeois. Post kiam mi diris mian opinion pri la karaktero de la sabata kunsido de la Programkomisiono, mi deklaris, ke estus necese revoĉdonigi la Meksikian rezolucion, eventuale sen la punkto 4, en la Pleno. Pri la temo ni interŝanĝis kelkajn pensojn. Je la 4.35 la reprezentantoj de UNESKO konsentis pri la praveco kaj justeco de la postulo voĉdoni pri la rezolucio en la Pleno. Je la 4.50 komenciĝis la lasta kunsido de la Pleno kaj la lasta kunsido de la Ĝenerala Konferenco entute.

Kiam mi revenis al la konferencejo, la granda salonego de Palacio Legislativo, mi sukcesis trapase, en granda rapideco, informi kelkajn delegaciojn, ke la Pleno voĉdonos pri la Meksikia rezolucio. Ĉiuj lokoj de la delegitoj estis okupitaj. Mankis eĉ ne unu ĉefo de delegacio. La galerioj estis plenŝtopitaj de ĵurnalistoj, diplomatoj kaj publiko. En atmosfero tre solena komenciĝis la lasta kunsido de la Oka Sesio. Mi sidis en la lasta vico, kie sur jam malpurata tabulo estis skribite "Observanto de Universala Esperanto-Asocio".

La kunsido, unue, aprobis kelkajn decidojn de diversaj komitatoj. Poste estis solena omaĝo al urugvaja poetino Ibarourou. Fine, ĉirkaŭ la 17.15, la

Prezidanto anoncis: “Ni transiras al la sekvanta punkto de la tagordo: La Internacia Peticio favore al Esperanto”. En la nomo de Meksikio parolis la Prezidanto de la Meksikia Delegacio S-ro Vallarta. Li diris, ke li proponas la rezolucion en nova formo, nome sen la punkto 4, tiel ke la antaŭa punkto 5 fariĝas nun nova punkto 4. Lin apogis la prezidanto de la Svisa Delegacio, S-ro Bourgeois. Post mallonga interveno de la brita delegito Sir Ben Bowen Thomas, la prezidanto D-ro Zavala Muniz voĉdonigis la rezolucion. Tridek manoj leviĝis “por”, kvin estis kontraŭ, deksep sin detenis kaj la ceteraj ne voĉdonis. Por la rezolucio certe voĉdonis Meksikio, Urugvajo, Svedujo, Norvegujo, Svislando, Nederlando, Luksemburgo, Francujo, Brazilo, Britujo, Italujo, Grekujo, Jugoslavio, Ĉinujo, Aŭstrujo, Honduraso, Izraelo, Nov-Zelando... Certe voĉdonis kontraŭ Danlando, Egiptujo, Kubo (vere strange!)... Certe sin detenis Sovet-Unio, Bjelorusio, Ukrainio, Pollando, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo... Pri la aliaj ŝtatoj mi ne estas certa.

Estis precize la 17.30, vendredon, la 10-an de Decembro, kiam la Prezidanto proklamis tiun historian decidon ne nur por nia Movado, sed ankaŭ por la kulturo de la mondo. En la salonego la proklamo estis salutata per forta aplaŭdo, apogata precipe de la galerioj. Homoj leviĝadis de sur siaj seĝoj kaj venadis al mi por gratuli... Eĉ tute nekonataj. Kelkajn minutojn post tio la Konferenco estis fermita.

La morgaŭan matenon ĉiuj gazetoj alportis la novaĵon. Ĝin ricevis ankaŭ la grandaj presagentoj. La gazeto “La Tribuna Popular” informis pri ĝi sub la titolo “Triunfo de Esperanto”.

Prave. Ĝi estis vera triumfo de la Internacia Lingvo.

La Adiaŭo

Du tagojn poste, la 12-an de Decembro, oni malhisas la standardojn sur la domo de la ekspoziciejo en Avenida Agriaciada 2025. La Unua Universala Ekspozicio de Esperanto finludis sian rolon pli ol sukcese. La 15-an de Decembro, okaze de la Zamenhof-tago, la Montevideaj Esperantistoj aranĝis festan bankedon. Ĉeestis kvardeko da personoj, inter kiuj la urugvaja delegito Prof. Clemente Estable kaj pluraj ĵurnalistoj. Prof. Fernandez Menéndez faris kortuŝan paroladon kaj donacis al mi artan pergamenan memoraĵon kun subskriboj de la geamikoj el Montevideo kaj belegan arĝentan tablan cigaredujon kun la dato de la 10-a de Decembro.

Forsendo de kelkaj telegramoj kaj leteroj. Adiaŭaj vizitoj al aŭtoritatoj kaj esperantistaj hejmoj. Jam estas la 17-a de Decembro. Estis ŝtorma tago, kiam mi enŝipiĝis en “Highland Princess”. Lastaj manpremoj. Ankoraŭ mansvingadoj de sur la kajo. “Partire è un po morire*” — mi rememoris pri la penso, eldirita antaŭ du tagoj dum la festa bankedo. Ne, tio ne estas tute ĝusta — mi pensis — ĉar krom la malgranda patrolando, ni esperantistoj havas ankaŭ la grandan, la mondon. Kaj en tiu granda patrolando ni ne forvojaĝas, ni restas kune. En tiu senco adiaŭ, karaj geamikoj el Monte, kaj dankon pro la granda helpo kaj morala apogo kiun mi trovis en via entuziasma medio.

La 6-an de Januaro mi elŝipiĝis en Londono.

Prof. D-ro Ivo Lapenna.

**Foriri estas morti iomete.*

Aldono A

Parolado de Prof. Ivo Lapenna en la Programkomisiono de Unesko la 4-an de Decembro

(Traduko el la franca)

Sinjoro Prezidanto !

Mi ne scias ĉu en tri minutoj oni povas diri ion ajn pli ol ke oni nenion povas diri, sed mi provos.

La interveno de Sinjoro la Dana Delegito havas tian karakteron, ke ĝi ne meritas ian ajn seriozan konsideron. Per siaj senfundamentaj asertoj li montris, ke li ne havas ideon pri la afero, pri kiu li tiel superece parolis. Por doni aŭtoritaton al siaj vortoj li akcentis, ke li estas lingvisto, sed mi povus al li citi multajn tre elstarajn lingvistojn—ekzemple Meillet, Müller, Marr, Ŝiŝmanov—kiuj havis pri Esperanto tute alian opinion. Mi povas lin informi—ĉar ŝajnas ke tio estas al li absolute nekonata—ke aliaj lingvistoj—ekzemple la Anglo Prof. Collinson, la Svedo Prof. Bjørn Collinder, la Franco Waringhien, por nomi nur kelkajn—parolas perfekte la lingvon kaj eĉ publikigis verkojn en Esperanto. Fakte, ili estas la solaj, kiuj, konante plene la aferon, povas doni objektivan juĝon pri Esperanto.

Mi sentas min devigita mencii ankoraŭfoje, ke la Peticio favore al Esperanto estis subskribita de 492 organizaĵoj kun 15,454,780 membroj kaj de preskaŭ unu miliono da personoj individue, el 76 landoj. Inter la subskribintoj troviĝas—kaj mi substrekas tiun ĉi fakton—ankaŭ 1607 lingvistoj. Ĝi estas la plej granda peticio iam farita al iu

internacia organizaĵo en la tuta kultura historio de la homaro.

Konsiderante la gravecon de la Peticio, kiel ankaŭ la fakton, ke la lingvaj baroj prezentas unu el la plej grandaj obstakloj al pli bona kunlaborado inter la popoloj, UEA klopodis prezenti al UNESKO kiel eble plej kompletan dokumentaron pri la naskiĝo kaj evoluo de Esperanto, pri la instruado de la lingvo, pri ĝia riĉa literaturo, gazetoj kaj revuoj, aplikado en la scienco kaj edukado. La Centro de Esploro kaj Dokumentado publikigis kaj distribuis al ĉiuj delegacioj, krom tio, specialan dokumenton sub la titolo “La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la celoj de UNESKO”. La granda ekspozicio je nuraj cent paŝoj de *Palacio Legislativo*, estas plia, impona dokumento, pri parto de tio, kio ĝis nun estas kreita en Esperanto kaj pere de ĝi. Interalie la ekspozicio enhavas ĉ. 3,000 librojn, ĉ. 600 gazetojn kaj revuojn, grandan nombron da sciencaj kaj teknikaj terminologioj. Mi aldonas, ke unu observanto de UNESKO partoprenis la laborojn de la Esperanto-kongreso en Zagreb, en 1953, kaj li havis la okazon persone vidi kaj aŭdi kiel perfekte la lingvo funkcias en la debatoj kaj diskutoj, en la Somera Universitato, en la artaj manifestacioj. Li povis konvinkiĝi, ke preskaŭ 2,000 personoj el plej diversaj landoj

Aldono B

La “Diskuto” pri Esperanto en Unesko*

Antaŭ UNESKO troviĝas Petskribo favore al Esperanto, subskribita de 492 organizaĵoj kun 15,454,780 membroj kaj de preskaŭ unu miliono da individuaj personoj. Inter la individuaj subskribintoj troviĝas, interalie, unu Respublika Prezidanto, 405 membroj de Parlamento, 5,262 profesoroj, 40,000 instruistoj, 200,000 kuracistoj, juristoj, inĝenieroj ktp. el 76 landoj. Ankaŭ la subskriboj de 1,607 lingvistoj troviĝas sur la Peticio. Tio estas la plej granda kampanjo iam farita en la kultura historio de la homaro.

Konsiderante tiun fakton kiel ankaŭ la grandajn obstaklojn, kiujn prezentas la lingvaj malfacilaĵoj en la internaciaj rilatoj, oni prave povis atendi ke UNESKO plej serioze studos la demandon. Senkonsidere al pozicio kiun tiu aŭ alia persono povas havi rilate al Esperanto, la plej elementa postulato estas trakti profunde sugeston de pli ol 16 milionoj da homoj, inter kiuj multaj apartenantaj al la intelektaj elitoj. Anstataŭe, en la kunsido de la

Program-Komisiono de la 4-a de decembro okazis afero, kiu havas nenion komunan kun la nomo de tiu Organizaĵo. En la menciita Komisiono la reprezentanto de Danlando, evidente ne sciante ion ajn pri la temo—kvankam li diris, ke li estas lingvisto—parolis neserioze kaj senfundamente kun la celo provoki ridojn. Li ekzemple ne hezitis diri, ke eble Esperanto taŭgas por verki urugvajajn menuojn, sed ne por la literaturo, kvankam je 100 paŝoj de la *Palacio Legislativo* troviĝas Ekspozicio de elstaraj verkoj de la tuta monda literaturo; kvankam en tiu sama Ekspozicio estas troveblaj verkoj originale skribitaj en Esperanto, ankaŭ de konataj lingvistoj, ekzemple de Prof. W. E. Collinson de la Universitato de Liverpool, de Prof. Bjørn Collinder de la Universitato de Uppsala kaj aliaj. Per sia kontraŭscienca kaj nekultura sinteno—kiu krome estas tre malbela ekzemplo de edukaj metodoj—li ofendis ne nur la 16,500,000 subskribintojn de la Peticio, ne nur la lingvistojn, kiuj

mirinde interkompreniĝas sen tradukoj, sen interpretistoj, sen tiuj teruraj aŭskultiloj, kiuj—kiel vi scias kaj sentas tre bone ankaŭ en la nuna momento—dolorigas la kapon kaj tre ĝenas la orelojn!

Mi esperas ke, post kiam la delegitoj estos legintaj kaj vidintaj tiun ĉi abundan dokumentaron, la Komisiono havos la eblecon fari decidon

objektivan rilate la Peticion. Dum tiu ĉi konferenco oni multe parolis pri pli bona kompreniĝo inter la popoloj. Por fini mi deziras tiurilate citi Romain Rolland, kiu diris: “Por ke la popoloj interkompreniĝu estas unue necese, ke ili komprenu. Esperanto donu la aŭdosenton al tiuj surduloj, el kiuj ĉiu, depost jarcentoj, estas enmurigita en sia lingvo.” Mi dankas, Sinjoro Prezidanto.

parolas Esperanton, sed ankaŭ la landon, kiu gastigas la Konferencon.

Estis vere pli ol senkuraĝiga bildo vidi kiel kelkaj delegitoj, kiuj devus doni ekzemplon almenaŭ de kultura sinteno, eĉ se mankas al ili la necesaj scioj, neracie reagis al la diroj de la Dana reprezentanto per ridetoj tipaj al homoj, kiuj nenion komprenas.

La Urugvaja delegito Prof. Clemente Estable, ŝokita de la situacio en la konferenco, forte reagis kontraŭ tiu konduto, nedigna de institucio, kia estas UNESKO. Li diris, ke Urugvajo ĉiam apogis ĉiujn rimedojn, kiuj faciligas la rilatojn ĉiaspecajn en la mondo, kaj opinias, ke unu el tiuj rimedoj estas Esperanto. Li firme deklaris, ke li energie malaprobas la vortojn de la Dana delegito kaj la agordon ekestintan en la Komisiono. Pro tio li subtenas la saĝan proponon de rezolucio prezentita de Meksikio. La voĉdono okazis en tute konfuza situacio, tiel ke eĉ

delegacioj de ŝtatoj, kiuj en siaj skribaj respondoj al la Sekretariato de UNESKO esprimis sian subtenon al Esperanto, ne sciis kion fari.

La Urugvaja Esperanto-Societo sentas sin devigata atentigi la publikon, kiu finfine pagas la kostojn de tiaj konferencoj, pri la maniero laŭ kiu la Program-Komisiono pri-traktis Peticion malantaŭ kiu troviĝas 16,500,000 homoj. En la Ĝenerala Konferenco de UNESKO oni multe parolis pri la neceso disvastigi la ideojn de UNESKO en la amasojn. Estus bone, ke UNESKO iom pli serioze ankaŭ aŭskultu la dezirojn de la amasoj.

Prof. Manuel Fernández Menéndez
Prezidanto

Prof. Víctor Luis Cao
Sekretario

* Komunikita aperinta en la gazetaro de Montevideo inter la 6a kaj la 8a de Decembro, 1954.

Aldono C

URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
Montevideo

Montevideo, la 4-an de Decembro 1954

*S-ro Cristóbal Möller-Sloth
Ĝenerala Konsulo de Danlando
Rondeau, 2002
Montevideo

Sinjoro Ĝenerala Konsulo !

En la Program-Komisiono de UNESKO la Dana delegito hodiaŭ deklaris, interalie, ke Esperanto ne povas esti instrumento de kulturo. Per sia nesperioza, kontraŭscienca kaj nekultura interveno li ofendis ne nur la 16,500,000 homoj, kiuj troviĝas malantaŭ la Petskribo favore al Esperanto, sed ankaŭ la landon, kiu gastigas la Konferencon. Liaj vortoj estas, krome, laŭ nia opinio, ofendaj por la Dana Registaro, kiu produktis la kultur-filmon pri Danlando kun Esperanto-teksto.

Esprimante al vi nian proteston kontraŭ tiu ago de la delegito de via lando, ni resendas al vi la filmon, kiun, en tiaj kondiĉoj, ni ne plu deziras prezenti.

Kun respekto,

Prof. Manuel Fernández Menéndez

Prezidanto

Prof. Víctor Luis Cao

Sekretario

* Letero transdonita al la Ĝenerala Konsulo de Danlando en Montevideo, kune kun la filmo pri Danlando, la 6-an de Decembro matene.

Aldono D

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Londono, Anglujo

Observanto :

D-ro Ivo Lapenna,
Hotelo Ermitage—Pocitos

Montevideo, la 8an de Decembro, 1954

Al Sinjoro don Justino Zavala Muniz,
Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco.

Kopie al : S-ro Luther Evans,
Ĝenerala Direktoro de Unesko ;
S-ro Prezidanto de la Plenumkomitato.

Altestimata Sinjoro Prezidanto !

Antaŭ ĉio mi esprimas al la Ĝenerala Konferenco la dankojn de mia Organizado pro la unuanima decido de la Administra Komisiono konsenti al Universala Esperanto-Asocio la konsultajn aranĝojn. Mi estas certa, ke tiu decido ebligas al la Esperanto-Movado kontribui en la estonteco ankoraŭ pli multe al la realigo de la celoj de UNESKO.

Koncerne la konatan Peticion favore al Esperanto mi estas libera atentigi pri jeno :

(1) Laŭ la decido de la Plenum-Komitato (letero de la Ĝenerala Direktoro de la 17a de junio, 1954, n-ro ODG/NGO/451.582) Universala Esperanto-Asocio estis invitita sendi Observanton al la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco. Ĝi akceptis la inviton kaj kun konsiderindaj financaj oferoj sendis min al Montevideo por reprezenti ĝin ĉe la Konferenco. La ĉeesto en la Konferenco signifas ankaŭ por mi persone grandan oferon, ĉar mi estis devigita forlasi miajn privatajn laborojn dum tri monatoj. Konsiderante la gravecon de la Peticio, subskribita de 492 organizaĵoj kaj preskaŭ unu miliono de personoj individue, mi estis certa, ke mi havos je dispono sufiĉe

da tempo por prezenti la aferon. Bedaŭrinde mi estis rajtigita paroli en la Program-Komisiono dum nuraj 3 (tri) minutoj. Mi aldonas, ke mi ne petis la permeson fari ian longan paroladon. Mi petis la Prezidanton de la Komisiono nur pri 10 ĝis 15 minutoj eĉ pri nuraj ses minutoj dum la dua konversacio, sed li ne povis konsenti. Mi ne riproĉas la Prezidanton, kiu estis ligita per antaŭa decido de la Komisiono. Mi ankaŭ ne riproĉas la Komisionon en kiu ajn senco. Mi nur deziras konstati, ke en tiel grava afero mi povis paroli nur tri minutojn, kio, evidente, apenaŭ sufiĉas por diri, ke oni nenion povas diri.

(2) Mi ne ricevis la parolon unua, tuj post la Raporto de la Sekretario (kvankam mi anoncis min por la parolo jam plurajn tagojn antaŭ la 4a de Decembro), kiel estus normale en tia afero, sed nur post la interveno de Sinjoro la Dana Delegito. En la atmosfero, kreita pro tiu interveno, eĉ tiuj tri minutoj perdis absolute ĉian sencon.

(3) En la nomo de la subskribintoj de la Peticio mi ne povas ne protesti kontraŭ la formo, en kiu efektiviĝis la interveno de Sinjoro la Dana Delegito. Ne temas, kompreneble, ĉi tie pri la pozicio rilate al Esperanto. Ĉiu rajtas esti, pro tiu aŭ alia kaŭzo, kontraŭ Esperanto, eĉ kontraŭ la ideo mem de komuna internacia lingvo. Tia opinio devas esti respektata eĉ tiam, kiam ĝi baziĝas sur nesciado aŭ malĝusta interpretado de la faktoj. Tute alia afero estas ridindigi publike, en la sino mem de UNESKO, lingvon, kiun akceptis kaj apogas unu miliono da personoj, kiu, krome, ĝuas la subtenon de 492 potencaj organizaĵoj. Paroli moke en ĉeesto de homo, kiu persone konas tre multajn feliĉajn familiojn, en kiuj Esperanto estas uzata kiel hejma lingvo—certe ne pro “fanatikismo”, sed tute simple ĉar ĝi estas la sola komuna lingvo de la geedza paro—ke tiu lingvo ne povas servi por esprimi la amon, estas ŝoke. Tiu primokado vundas ne nur la plej noblajn sentojn de familia amo, sed eĉ ofendas la sanktecon de la geedziĝa ceremonio (eklezia aŭ civila) farita, en tiaj okazoj, en Esperanto. Paroli ironie pri la valoro de la Esperanta literaturo—beletra kaj scienca, traduka kaj originala—estas ofende por ĉiuj, kiuj verkas en tiu lingvo, inkluzive de pluraj lingvistaj kolegoj de Prof. Blinkenberg, inter kiuj elstaran lokon okupas D-ro W. E. Collinson, Profesoro en la Universitato de Liverpool, kaj Prof. Björn Collinder, de la Universitato en Uppsala. Fine, aserti ke Esperanto entute ne estas lingvo kaj ke ĝi ne servas la kulturon, estas ofende por la subskribintoj de la Peticio, sur kiu troviĝas la nomoj ankaŭ de Sinjoro Vincent Auriol, eks-Prezidanto de la Franca Respubliko, D-ro Willem Drees, Ministro-Prezidanto de Nederlando (tre bona esperantisto, kiu faris mirindan paroladon la pasintan aŭguston dum la Esperanto-Kongreso en Haarlem en tiu lingvo, kiu, laŭ profesoro Blinkenberg, ne estas lingvo), D-ro Ing. Leopold Figl kaj multaj aliaj elstaraj personecoj de la politika, scienca, eduka kaj kultura vivo. Tiu ĉi aserto estas, plue, kontraŭa al la koncepto de la Dana Registaro, ĉar tiu ĉi registaro, interalie, distribuas *kulturan* filmon pri Danlando kun teksto en Esperanto. La parolado de la Dana Delegito estas, krome, kontraŭa al la Statuto de UNESKO, kiu proklamas egalecon de lingvoj, kaj al la Rezolucio kontraŭ la rasa . . . kaj *lingva* diskriminacio, akceptita antaŭ kelkaj tagoj en tiu sama Program-Komisiono.

(4) Mi ne deziras ĉi tie analizi la agordon, en kiu okazis la voĉdono. La fakto estas, ke la Meksikia rezolucio estis rifuzita. Dum la diskuto, tamen, la Norvega Delegito, Prof. Sommerfelt, diris, ke li povus voĉdoni por la punktoj 1, 2, 3, 5, sed ne por la punkto 4 de la projekto de rezolucio. Ŝajnas al mi, ke tio signifis novan proponon. Post la malakcepto de la projekto en ĝia tuto, estis necese, laŭ mia opinio, revoĉdoni pri la teksto sen la punkto 4. Mi opinias, ke en tia formo, la projekto de rezolucio estus konforma al la konkludoj de la Sekretariato en la Dokumento 8C/PRG/3, kaj al la respondo, kiun donis al la Sekretariato la Unuiĝinta Reĝlando en sia letero de la 2a de Novembro 1953 (dokumento 8C/PRG/3 paĝo 9). Tio ĉi samtempe estus konforma al la Rezolucio 4.14 de la Sepa Sesio, en kiu estas dirite, ke la Oka Sesio decidus kiun sekvon doni al la Peticio. Ĝis la nuna momento, laŭ mia scio, la Oka Sesio faris nenian tiurilatan decidon. Post la rifuzo de la Meksikia projekto de rezolucio en la Program-Komisiono, la demando, fakte, restas malfermita.

(5) Mi opinias,—kaj en tiu ĉi punkto mi parolas pli kiel sincera laboranto por la celoj de UNESKO en mia kvalito de profesoro de internacia juro, de verkisto kaj preleganto ol kiel observanto de la Universala Esperanto-Asocio—ke estus vere necese, ke la Ĝenerala Konferenco donu ian respondon al la Peticio. En tiuj ĉi tagoj denove aperis en la monda gazetaro amaso da artikoloj kaj informoj pri tiu ĉi afero (oni ne forgesu, ke la Peticion subskribis pli ol 1,500 ĵurnalistoj). Jam ĝis la nuna momento ĉirkaŭ 25 metroj kvadrataj de muro en la Esperanto-Ekspozicio en Avenida Agraciada, 2025, estas plene kovritaj per eltranĉaĵoj el gazetoj kaj revuoj, kiuj skribis pri la Peticio troviĝanta antaŭ UNESKO. Kaj novaj eltranĉaĵoj ĉiutage alvenas el ĉiuj partoj de la mondo. La interesiĝo de la publiko estas tre granda kaj ĝi atendas almenaŭ ian respondon al la Peticio.


(6) Se nek la Prezidentaro de la Konferenco, nek la Plenum-Komitato povos akcepti la sugestojn formulitajn en la punkto 4a, aŭ trovi similan kontentigan solvon, mi petas vin aldoni tiun ĉi leteron al la dokumentoj de la Konferenco rilatantaj tiun ĉi demandon.

Mi tre petas pardonon pro la ĝeno, kiun mi kaŭzas al vi kaj al la Prezidentaro. KREDU al mi, Sinjoro Prezidanto, ke mi neniam tion farus, se mi ne sentus profundan respondecon ne nur antaŭ mia Organizado kaj la subskribintoj de la Peticio, sed ankaŭ antaŭ UNESKO.

Kun la esprimoj de alta estimo,

D-ro Ivo Lapenna.

Diskriminacio = Maljusta diferencigo de unu objekto el grupo.



Aldono E

Montevideo, la 9an de Dec., 1954.

Al Sinjoro Prezidanto de la Ĝenerala Konferenco

Sinjoro Prezidanto :

Konforme al la art. 68 de la Interna Regularo mi petas vin rajtigi min paroli dum la kunsido de la Pleno de vendredo, la 10a de Dec. Mi deziras fari deklaron pri la Internacia Peticio favore al Esperanto.

Bonvolu akcepti, Sinjoro Prezidanto, la esprimojn de mia konsidero.

*D-ro Ivo Lapenna**Observanto de Universala Esperanto-Asocio***William Auld :****Pensoj Post Montevideo**

Lin armas fera fido, integro kaj kuraĝo,
kaj lian citadelon ne breĉas malespero :
kiam plej malfavore grimacas sortvizaĝo,
tiam li plej obstine ne cedas pri l' konkero.

Ho, Esperanto, lingvo de la homar' futura,
kiel li vin servadas, kun kia amo pura !

Malican trivialon de ruzaj Blinkenbergoj
li venkas per la ardo de pravo kaj sincero,
kaj draŝas mokemulojn per nudaj vero-vergoj :
lia koler' majestas kvazaŭ de Jupitero !

Al Esperanto, kara revo kaj pli ol revo,
Lapenna sin dediĉis preter la nura devo !

Ni, kiuj Esperanton amas, lin amas kore.
Mirakle li en Montevideo garnizonis ;
en ĉi solena horo pripensu ni explore :
ĉu ankaŭ ni ĝis limoj de nia forto donis ?

Samideanoj ! staras li antaŭ ni modele :
lian ekzemplon grandan imitu ni fidele !

La Universala Esperanto-Ekspozicio en Montevideo

Ĉi tiu—tute certe la plej granda kaj plej impona ekspozicio pri Esperanto—estas organizita de la Urugvaja Esperanto-Societo en kunlaboro kun la Centro de Esploroj kaj dokumentado.

Je enveno en la ekspoziciejo—salonego de la Instituto J. Batle y Ordóñez en tuja proksimeco de la Konferencejo de UNESKO—la unua impresado estas tiu de harmonio kaj digno, kaj samtempe de granda abundego. Kaŭzas tion la regantaj

trankvilaj koloroj de la tegaĵo de muroj kaj tabloj en bruneta, flaveta kaj verdeta nuancoj kaj la racia dispartigo de ĉiuj fakoj, kio donas tujan superrigardon.

Laŭlonge de la muroj, same kiel en la mezo de la salono, tabloj ĝis la planko kovritaj per flaveta ŝtofo, elmontras la abundan materialon.

Jen, tuj apud la enirejo, fotokopio de la unua lernolibro en rusa lingvo. Sekvas granda fako de studmaterialo; ĉirkaŭ 600 lernolibroj en kvardeko da

*Perspektivo
tra la
ĉefa
aleo*



*Kelkaj
el la
libroj*

lingvoj, kompleta serio de ŝlosiloj, lernolibroj por infanoj, por blinduloj, gramatikoj esperante-esperante kaj granda aro da vortaroj en multaj lingvoj, inter kiuj precipe la belegaj ĉina kaj japana elstaras.

Apud aparta fako pri la originala kaj traduka verkaro de Zamenhof trafas la okulon grandega fako pri tradukoj de beletristikaj verkoj el diversaj literaturoj. Ĉi tie la literaturamanto trovas ĉ. 2,500 verkojn el trideko da lingvoj. Tra la literaturoj hebrea, greka, latina, angla, franca, germana, rusa, pola, bulgara, sveda,

ĉ. 80 libroj pri trideko da landoj, inter kiuj belaj eldonaĵoj pri Brazilo, Jugoslavio, Norvegujo, Danlando, Islando, Japanujo, Pollando, Nederlando k.a. Ne mankas ankaŭ faketo de kantaroj.

En la mezo de la salonego tuj tiras la atenton granda scienca fako. Ĉi tie troviĝas, krom ĉ. 40 fakaj vortaroj, tradukaj kaj originalaj verkoj pri plej diversaj sciencaj temoj, pri filozofio, pri politiko kaj religio. Kompletigas la fakon primovadaj verkoj, sciencaj kaj teknikaj gazetoj kaj resumoj en Esperanto de nacilingvaj verkoj.



svisa, hungara, ĉeĥa, belga kaj nederlanda oni alvenas ĉe la japana, ĉina, sanskrita, persa kaj multaj aliaj. Ĉi tiu fako vekas grandan atenton, miron kaj admiron.

Sekvas multaj kompletaj serioj eldonitaj de diversaj eldonejoj kaj apude oni trovas la originalan literaturon kun ĉ. 200 libroj. Kaj jen ankoraŭ alia aspekto de nia literaturo: verkoj kaj gvidlibroj pri diversaj landoj kaj popoloj. Fako de

Laŭlonge de unu tuta muro troviĝas ĉiaj aperantaj kaj aperintaj gazetoj kaj revuoj, ĉ. 600 diversaj. Antaŭ tiu ĉi impona bildo de la Esperanta gazetaro multaj vizitantoj haltas kun aparta intereso. Fako kun jarlibroj, almanakoj, kalendaroj k.s. troviĝas apude.

Okupas unu tutan muron grandega mapo de la mondo, sur kiu estas indikitaj per diverskoloraj signoj: lokoj kun delegitoj (verda), Esperanto-



Kelkaj el la gazetaj eltranĉaĵoj. La ekspozicio estis pli bone vizitata ol la 7-8 samtempaj ekspozicioj de Unesko, prenitaĵ kune.

societoj (ruĝa: unu signo = dek societoj), sidejoj de gazetoj, eldonejoj, int. Esp. organizaĵoj (flava).

En aparta parto de la salonego, sur specialaj kartonegoj, ĉ. 600 diversaj afiŝoj, prospektoj, gvidfolioj kaj komercaj reklamoj pri landoj, urboj, foiroj kaj entreprenoj prezentas buntan mozaikon.

Apud la elirejo oni vidas naci-lingvajn verkojn pri Esperanto, tradukojn el Esperanto en naciaj lingvoj, reklamilojn pri Esperanto ktp. Super tiu ĉi parto, la tuta muro, ĝis la plafono, estas kovrita per gazet-eltranĉoj el la tuta mondo pri la temo: "Esperanto antaŭ UNESKO". Tiu fako konstante pligrandiĝas dum la ekspozicio, ĉar senĉese la kunlaborantoj sendas pliajn eltranĉaĵojn. Ĉi tiu parto tiras grandan atenton kaj ne senkaŭze, ĉar malofte aperis pri iu



ajn temo de UNESKO tiom da publikaĵoj. Laŭtakse la fako jam enhavas 1,500 eltranĉaĵojn.

Plue, ornamas la murojn en konvenaj lokoj konsidere la materialon sur la tabloj, ok belegaj, en koloro pentritaj grafikaĵoj. (De kelkaj el ili aperis bildoj en la revuo "Esperanto" antaŭ pluraj monatoj). Ili temas pri: 1. nombro de lernolibroj; 2. metodoj

de lernado ; 3. evoluo de Esperanto en ciferoj ; 4. nombro de Esperanto-libroj ; 5. nombro-kresko de la Esperanto-Movado en la mondo ; 6. radio-stacioj kiuj dissendas en Esperanto ; 7. disvastigo de informoj per la Esp. gazetaro ; 8. kongresoj uzantaj kaj neuzantaj Esperanton. Ĉi tiu lasta provokas multegan atenton, ĉar tre konvinke ĝi prezentas la malekonomiecon de multlingvaj kongresoj.

Pendas sur la muroj ankaŭ bela



portreto de Zamenhof pentrita per oleo, kaj unu foto. Kaj, fine, ornamas la murojn eldiroj de famaj personoj pri Esperanto kaj sloganoj, ĉio bele pentrita sur verdeta fono, kaj multaj fotoj de niaj kongresoj.

Entute, la ekspozicio estas la plej perfekta dokumento pri Esperanto kiun oni povas imagi. Ĝi estas malfermita ĉiutage de la 10-12 matene kaj de la 6-9 vespere, dum kiu tempo tre akurate deĵoras la Montevideaj esperantistoj.

Antaŭ la inaŭguro okazis gazetar-konferenco. La ĵurnalistoj montris sin ege impresitaj kaj ĉiuj tre favore skribis pri ĝi. Entute, la urugvaja gazetaro skribis en la lastaj semajnoj jam kvarfoje pri nia afero. Tio kaŭzas ke vizitas la ekspozicion 400-500 personoj tage, kio estas multe pli ol la vizito al 7-8 diversaj UNESKO-ekspozicioj nun okazantaj en Montevideo, prenitaj kune.

La solenan inaŭguron ĉeestis ĉ. 200 personoj, inter kiuj troviĝis pluraj altaj aŭtoritatuloj, kiel la reprezentantoj de la Prezidanto de la Urugvaja Nacia Registara Konsilantaro, S-ro Andrés Martínez Trueba, de la Ministro pri Edukado, de la Urbestro k.a. De UNESKO ĉeestis S-ro Jean Thomas, direktoro de la departemento pri Kulturaj Aktivecoj, S-ro Elvin, direktoro de la departemento pri Edukado kaj membroj de pluraj delegacioj. Ĉeestis ankaŭ kelkaj famaj urugvajaj verkistoj kaj artistoj. La tuta ceremonio estis solena kaj digna.

Restas akcenti la grandan helpon kaj sinoferon de la Montevideaj Esperantistoj, kiuj en la du semajnoj antaŭ la inaŭguro, sub gvidado de D-ro Lapenna, tra kies manoj pasis ĉiu ero ĝis la plej eta flugfolio, sindone laboradis en la ekspoziciejo.

ne nur dumtage, sed ofte ankaŭ dum la noktoj. Netakseblaj estas la apartaj meritoj de Prof. Fernández Menéndez, kiu i.a. mem desegnis kaj pentris la belegajn grafikaĵojn, eldirojn kaj sloganojn.

Favora helpo por tiu ĉi grandioza spektaklo venis el multaj direktoj. Oni ricevis senpage la salonon. Oni havis financon subtenon de multaj

flankoj: interalie la urbestro mem de Montevideo donacis sumon, egalan al proksimume £120.

La ekspozicio restis malfermita ĝis la 12-a de decembro. Poste la tuta ordigita kaj klasigita materialo restas je dispono de la Movado por utiligo en konvenaj okazoj.

Bunta = Multkolora

Slogano = Agita devizo



“La plej grava verko post la Infero-traduko de Kalocsay”.—*W. Auld.*

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo: bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis: ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Publika Dankesprimo

UEA kaj la tuta Esperanto-Movado ŝuldas sian dankon al ĉiuj organizaĵoj, institucioj, redakcioj kaj unuopuloj, kiuj kunlaboris en la UNESKO-afero kaj per sia laboro, diversaj aktivecoj, aŭ financa helpo kontribuis al la sukceso en Montevideo kaj, pretere, vaste diskonigis Esperanton en plej diversaj medioj. Ilia nombro estas tiel granda, ke estas absolute maleble citi ĉiujn unuope, kvankam ili tion pli ol meritis. Tial mi limigas min al kolektiva mencio, kaj en la nomo de la Asocio kaj en mia propra tutkore dankas al la :

Kunlaborantoj en la UNESKO-afero (entute 42 por 68 landoj) pro ilia akurata plenumo de ĉiuj konsiloj, rapida respondado al ĉiuj demandoj kaj plenumita laboro ĉe siaj propraj UNESKO-komisionoj aŭ ĉe la UNESKO-komisionoj kaj aliaj kompetentaj aŭtoritatoj en la landoj, pri kiuj ili respondecis ;

Kunlaborantoj de CED, kiuj kun scienca objektiveco plenumis diversajn esplorojn kaj studojn, precipe al tiuj, kiuj kontribuis al la kunmeto de la Raporto de CED al la Sekretariato de UNESKO ;

Kunlaborantoj de CED kaj landaj asocioj, kiuj kunmetis la raportojn pri Esperanto en siaj landoj kaj transdonis tiujn raportojn al siaj landaj UNESKO-aŭtoritatoj ;

Getradukantoj de CED por la angla, franca, hispana kaj nederlanda lingvoj pro iliaj perfektaj, rapidegaj tradukoj de ĉiuj dokumentoj kaj raportoj de CED en tiu ĉi afero ;

Membroj de la Organiza Komitato de la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto pro la organizo, en plej intima kaj harmonia kunlaboro kun CED, de la plej granda Esperanto-Ekspozicio en la historio de la Esperanto-Movado ;

Ĉiuj institucioj, eldonejoj, redakcioj

kaj unuopuloj (entute pli ol 100), kiuj sendis materialon por la Ekspozicio en Montevideo kaj eĉ la poŝtelspezojn mem pagis ;

Ĉiuj esperantistoj de Montevideo (kaj ankaŭ multaj neesperantistoj), kiuj ĉiurilate faciligis mian taskon tie, precipe per rapidaj tradukoj, intervenoj, deĵorado en la Ekspozicio ktp. kaj speciale per la forta morala apogo ;

La Landaj informaj fakoj kaj gazetaraj servoj (entute 25) kiel ankaŭ **la lokaj kunlaborantoj de tiuj servoj** kaj la rektaj kunlaborantoj de la Informa Fakoj de UEA pro la akurata plenumo de ĉiuj konsiloj de la Informa Fakoj de UEA, vasta utiligo de la sendita materialo, aperigo de pluraj centoj da artikoloj kaj informoj en siaj landoj pri Esperanto antaŭ UNESKO kaj alsendo de la eltranĉaĵoj al Montevideo (25 kvadrataj metroj de muro en la Ekspoziciejo estis kovritaj per nuraj eltranĉaĵoj el gazetoj kaj revuoj pri Esperanto kaj UNESKO) ;

Ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj finance helpis CED kaj tiamaniere ebligis ĝian ekziston kaj funkciadon ;

Ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj kontribuis al la *Fondaĵo Montevideo* kaj tiamaniere ebligis la reprezentigon de UEA en Montevideo kaj la okazigon de la Ekspozicio ; specialan dankon al la Urbestaro de Montevideo pro la donaco de 1,000 peso (ĉ. 120 anglaj pundoj) ;

Fine, sed ne laste, tute apartan dankon al **Sennacieca Asocio Tutmonda**, kiu en tiu ĉi afero plej lojale kunlaboris.

El ĉiuj partoj de la mondo mi ricevis multajn gratulojn. Mi dividas ilin kun ĉiuj kunlaborantoj kaj helpantoj !

Ivo Lapenna.

Esperanto en la Dokumentoj de Unesko

Okaze de la Ĝenerala Konferenco

Pluraj dokumentoj, eldonitaj de UNESKO okaze de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo rilatas nur al Esperanto. En aliaj Esperanto estas menciita en diversaj kunteksto. Estas utile doni liston de ĉiu el tiuj dokumentoj por faciligi la orientiĝon al la personoj, kiuj deziros ilin trastudi. En la suba listo estas konservita la originala angla aŭ franca titolo kaj aldonitaj la koncernaj signoj kaj datoj :

(1) Cirkulera letero de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO N-ro CL/720 de la 9-a de Februaro 1953 al la Ŝtatoj-Membroj pri la Rezolucio 4.14 koncerne Esperanton, akceptita de la Pariza Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO kune kun la teksto de la menciita Rezolucio.

(2) **Report on the International Petition in favour of Esperanto** (Raporto pri la Internacia Peticio favore al Esperanto) 8C/PRG/3 de la 1-a de Junio 1954.

(3) **Report on the International Petition in favour of Esperanto** (Raporto pri la Internacia Peticio favore al Esperanto) 8C/PRG/3 Add. (Addendum), kiu entenas la Memorandon de la Kongreso en Haarlem.

(4) **Ordre du Jour Révisé de la Huitième Session de la Conférence Générale** (Reviziita tagordo de la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco) 8C/1 (Rev.) de la 6-a de Novembro 1954, pto 8.4.4.1.

(5) **Journal de la Conférence Générale** (Ĵurnalo de la Ĝenerala Konferenco), N-ro 3 de la 15-a de Novembro 1954 enhavas sur la p.3 mencion pri allaso de la observanto de UEA al la Ĝenerala Konferenco.

(6) **Provisional Summary Record of the Twenty-ninth Meeting, Programme and Budget Commission** (Provizora resuma protokolo de la 29-a kunveno, Komisiono por la programo kaj budĝeto) 8C/PRG/SR.29 (prov.) de la 9-a de Decembro 1954, pp. 16-18 (atentigo : temas pri la provizora protokolo, kiu poste devis esti korektita, ĉar ĝi enhavis plurajn malĝustaĵojn).

(7) **General Conference, Provisional Verbatim Report of the Eighteenth Plenary Meeting** (Ĝenerala Konferenco, Provizora laŭvorta raporto pri la 18-a kunsido de la Pleno) 8C/VR.18 (prov.) de la 10-a de Decembro 1954 (pp. 16-18 entenas la diskuton pri Esperanto kaj la historian decidon).

(8) **International Petition in Favour of Esperanto, Draft Resolution** (Internacia peticio favore al Esperanto, Projekto de Rezolucio) 8C/DR/116 de la 2-a de Decembro 1954.

(9) **Recommendations of the Executive Board Regarding Applications by International Non-Governmental Organizations for Admission to Consultative Arrangements** (Rekomendoj de la Plenumkomitato rilate la Petskribojn de Internaciaj neregistaraj organizaĵoj por allaso al konsultaj aranĝoj) 8C/ADM/22 de la 30-a de Aŭgusto 1954 pp. 32-34 (entenas la strukturon de UEA kaj de la ĉefaj publikaĵoj).

(10) **Conseil Executif, Trente-neuvième session, Procès-Verbal Provisoire, Troisième séance** (Plenumkomitato, 39-a sesio, protokolo provizora de la 3-a kunsido) 39 EX/SR.3 (prov.) de la 6-a de Novembro 1954 p. 3 (entenas la rekomendon de la Plenumkomitato al la Ĝenerala Konferenco konsenti al UEA la konsultajn aranĝojn).

(11) **Dokumento 8C/ADM/22 Add. 2** de la 19-a de Novembro 1954 entenas sub pto 17 la rekomendon de la Plenumkomitato, menciitan sub (10) de tiu-ĉi listo.

(12) **Dokumento 8C/ADM/SR.16** (prov.) de la 29-a de Novembro 1954 entenas sur la p. 9 la decidon de la Administra Komisiono konsenti al UEA la konsultajn aranĝojn. Tiu decido estis aprobita de la Pleno la 8-an de Decembro.

(13) **Journal de la Conférence Générale** N-ro 23 de la 9-a de Decembro, p. 3 mencias la decidon de la Pleno koncerne la konsultajn aranĝojn.

(14) **Journal de la Conférence Générale** N-ro 10 kaj 13 de la 23-a kaj 26-a de Novembro, sur paĝoj 40 kaj 52 entenas informojn pri la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto.



40-a Universala Kongreso de Esperanto

30. VII-6. VIII, 1955, BOLONJO, Italujo

Adreso : CIT, Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo

Banko : Banco di Napoli, Bologna, Konto 2824

Ĝiro : Grupo "A. Tellini", Piazza Medaglie d'Oro 3, N. 8/20620

N-ro 3 OFICIALA KOMUNIKO Februaro 1955

Teatra Vespero : Por la *Jubilea Kongreso* la L.K.K. prezentos la faman komedion de Gogol "La Revizoro" en traduko de Zamenhof. Teatra trupo de Bolonjo jam studas Esperanton kaj okupiĝas pri la roloj.

Folklor Vespero : L.K.K. ripetas sian alvokon, ke folkloraj danctropoj sin anoncu por prezento de po unu karakteriza danco popola dum eventuale aranĝota Folklor Vespero sur la ĉefa placo de Bolonjo.

Hotelaj tarifoj : Prospektoj kun hotelaj kategorioj kaj prezoj estas dissenditaj en januaro al ĉiuj aliĝintoj kaj al karavan-organizantoj. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ fari vian rezervon per la Oficiala Mendilo, ĉu senpere aŭ—se vi vojaĝos per karavano—per via karavan-organizanto. Detaloj pri la oficialaj ekskursoj sekvos.

Fakaj kunvenoj : Al organizitaj fakaj asocioj la L.K.K. petas anonci sin kiel eble plej baldaŭ. La provizora programo devos esti prezentata al la Estraro de U.E.A. je Pasko por aprobo.

Pagoj al la kongreso : Por eviti postan ĝenon estas konsilinde, ke kongresanoj je sia unua pago al la kongreso pagu pli grandan sumon, kiu estos skribata je

kredito por posta uzo. Kiuj ne venos al la kongreso ricevos tiujn kreditojn.

Internacia Somera Universitato : Bonvolu ne direkti proponojn pri prelegoj por I.S.U. al la L.K.K. Tiu aranĝo estas de U.E.A.

Kongresa Glumarko—korekto : La bela Glumarko de la Jubilea Kongreso estas akirebla en folioj de po 25 markoj (ne 50 kiel ni anoncis) por 50 liroj, 1 rpk. aŭ 6 pencoj. Mendu senpere ĉe la kongreso aŭ per la Perantoj. Uzu ĉi tiun belan propandilon vaste sur viaj korespondaĵoj !

Aliĝoj : Venas al la kongreso nekutime granda nombro da aliĝpetoj kun pago sed sen aliĝilo aŭ ajna informo. La banko donas nur la nomon kaj la sumon. Nepre sendu aliĝilon.

Statistiko (ĝis 31 dec.) : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 4, Belgujo 10, Brazilo 3, Britujo 44, Danujo 19, Finnajo 4, Francujo 55, Germanujo 24, Hispanujo 4, Italujo 130, Japanujo 1, Jugoslavio 25, Kubo 1, Maroko 1, Nederlando 64, Norvegujo 16, Novzelando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 19, Svisujo 18, Urugvajo 1, Usono 4. Sumo, el 25 landoj, 452. (Nemembroj de U.E.A. 16%).

Nome de L.K.K., Mason Stuttard, K.K.S.


FESTU MONTEVIDEON PER PARTOPRENO EN LA POMPA JUBILEA KONGRESO!

(15) **Report by the Director General and the Executive Board on the Activities of the Organization During the Year 1953** (Raporto de la Ĝenerala Direktoro kaj de la Plenumkomitato pri la aktivecoj de la Organizaĵo dum la jaro 1953) :

(a) sur p. 52 akcentas, ke unuavice UEA helpis al efektivigo de la celoj de la programo de UNESKO ;

(b) sur la p. 129 raportas mallonge pri la Peticio favore al Esperanto sub la pto 9 ;

(c) sur la p. 129 raportas pri la reprezentigo de la Sekretariato ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb.



Tra la Mondo Esperantista

La grandioza tondro sur aliaj paĝoj de la revuo devigas nin ĉimonte mallaŭtigi ceterajn sciigojn ĝis nura pepo. Jen, eĉ nia pardonpeta versaĵo devas kunpremi sin en proza formo (kaj tio estas iom tre, ĉu ne?). *Ni kore petas pri pardono, ke l' verdan mondon ni reduktas, tondante ĉion je duono, eĉ kuirante en kaldrono ĝis restis el bulten'—buljono, kie silaboj spasme ruktas . . . Ni kore petas pri pardono, ke l' verdan mondon ni reduktas !*

London muzikas. 1. En ĉambra koncerto je 8 Dec. ĉe la *Reĝa Kolegio de Muziko*, oni prezentis 4 Esperantajn kantojn komponitajn de nia Frank Merrick. Je la 1 Dec., ĉe studenta koncerto, oni programis 6 kantojn de li (2 laŭ poemoj de Kalocsay). Ambaŭokaze kantis Gloria Spinney el Nova Zelando.

2. Je la 12a de Dec., okaze de Esperanta Diservo en Londono, oni prezentis la Kristnaskan kantaĵon *Bethlehem* en traduko de S-ro Gentle.

Kontinuo. Regiona E-konferenco en Liverpool honoris Prof. Collinson, emeritan Esperanto-lektoron ĉe la Universitato, kaj salutis D-ron Wiener, lian sekvanton. Ĉeestis 90 p.

El la fonto mem. Ĉe semajnfino en ŝika marborda urbo Southport (Anglujo) nia Vicprezidanto S-ro Kennedy estis gastparolanto. Li parolis klerige pri UEA kaj la eksperimento *Midlothian* (vd. oktobran n-ron!).

Tre mallonge ! Ŝtata Stenografia Instituto en Praha (str. Dušný 7), deziras ricevi fremdlingvajn stenografiajn publikaĵojn: lernolibrojn, revuojn k.s. Tutmondaj samideanoj, precipe en Azio kaj Afriko, volu sendi tiaspecajn eldonaĵojn al la supra adreso !

Dulingva romantiko. En Bolzano (Italujo) okazis kulturfesto, ĉe kiu oni ludis el *Romeo kaj Julieta* en lingvoj itala kaj Esperanta. La Esperanta traduko (de R. Rossetti) gajnis la "laŭron Verona".

Antipodo migras. Ĝis nun en Italujo pli ol 8,000 personoj vidis la filmon *Aŭstralio hodiaŭ*.

Solviĝas Babelo. Post prelego de D-ro Privat, stariĝis en la fama *Internacia Lernejo de Grande Boissière*, Ĝenevo, Esperanto-kurso kun lernantoj el 24 landoj. Ĝin gvidas . . . S-ro Ralph Harry, Ĝenerala Konsulo de Aŭstralio !

Ĉu eble vi ? *Oddfellows* estas societo analoga laŭ aspiroj al Esperanto. Esperantistaj membroj (ankaŭ anoj de Rebekka kaj Manchester Unity) skribu al S-ro Fritz Schwartz, Wiesenstrasse N-ro 1, THUN-Bn, Svislando.

Deĉifru ! Amantoj de logogrifoj, krucvortoj, rebuso, ŝaradoj, helpu ke aperu dua numero de *Malgranda Enigma*, unika vort-enigma gazeto. Duonjara abono: 180 din., 0.80 dol. aŭ 280 fr.fr. ĉe "Mladi borac", BEOGRAD, Kralja milutina 8, poŝtfako 61.

Venka letero. Al la letera konkurso de Esperanto-Asocio de New Jersey (Usono): Kial la Unuiĝintaj Nacioj bezonas Esperanton? venis leteroj el 20 landoj. La premion gajnis S-ro H. Brisbane Eldon el Southport, Anglujo.

Sub la sankta signo de . . . "Prospero", la Esperanto-grupo en Neustadt/Weinstrasse, organizos la 33an Germanan E-Kongreson en pentekosto, 1955.

Internaciaj renkontiĝoj en Italujo okaze de la 40a Universala Kongreso en Bologna

Bonvena semajno (23–30 julio)

Adiaŭa semajno (6–13 aŭgusto)

en Villeuropa, internacia vilaĝo inter Ventimiglia kaj Menton sur "Marbordo de floroj".

Aranĝoj en tendaro kaj amasloĝejo.

Informojn ĉe: Turisma Oficejo, Itala Esperanto-Federacio, Via Saluzzo 44, Torino, Italujo.



Enigma Konkurso N-ro 95

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj : N-ro 212 :

Se sunon havas lia voj'
kaj sorto lin favoras,
la vagabondo pro la ĝoj'
per kanto oratoras.

Se ombron havas la kupol'
de lia firmamento,
li kantas, kantas por konsol'
kun korkaresa sento.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 91-a konkurso : S-ro A. G. Rickwood (Angl.) 117, F-ino J. Dedieu (Franc.) 117, S-ro H. Westergaard (Dan.) 114 p.


Enigmo N-ro 215 : AFO - AGR - AKV - ALO - ANT - ATI - ATO - AŬT - BAD - BRO - BUN - CIO - DIK - EKS - EKS - EKV - ELO - EMI - ENV - ERG - ESA - EŬF - IDE - IGA - IKO - IME - INO - IRI - KSA - KSO - LAB - MIĈ - MIO - MON - NCO - NEA - NIO - NTA - NTO - NTO - NTO - OBL - ODO - OKC - OKR - OMA - ONO - ONO - ORA - ORO - ORO - ORT - PAN - PAT - PLU - PRO - REG - REN - RIA - RKO - ROM - RTO - SAK - SEP - SIO - SMO - SOF - SPO - TAT - TEM - TRI - TRO - URO - VER - VIZ.

El la ĉi-supraj 75 litergrupoj faru laŭ la ĉi-subaj klarigoj 25 naŭliterajn vortojn, kies komencliteroj en la donita sinsekvo formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. sudfranca mezepoka poeto ; 2. dirmaniero por mildigi krudecon ; 3. speco de frenezeto de iu kiu havas unusolan ideon ; 4. respektinda maljuna familiestro ; 5. valorpapero ; 6. juĝistaro ; 7. parto de la horizonto ; 8. implikita erariga interplektaĵo de vojoj ; 9. longo de etenditaj flugiloj de birdo ; 10. parto de armeo ; 11. scienco pri terkulturado ; 12. monato ; 13. muzikilo ; 14. punkto kie okazas intersekco de ekvatoro kaj ekliptiko ; 15. ŝtatestro kun absoluta povo ; 16. pastaĵo ; 17. plietendiĝo ; 18. literatura movado en

la 15-a kaj 16-a jarcentoj ; 19. konforma al la tradicia doktrino ; 20. gravuraĵo ; 21. ne longe daŭranta ; 22. uzi ion, valorigante ĝin por sia profito ; 23. literatura doktrino de la 19-a jarcento ; 24. absoluta regnestro ; 25. meminciata.

Enigmo N-ro 216 : La vortoj de kvin esprimoj el la proverbaro intermiksiĝis. Mi donas ilin en alfabeto sinsekvo, kaj vi klopodu reordigi ilin. aŭskultas - eble - faroj - faru - ĝin - hodiaŭ - hundo - insultas - kiam - kion - kokidojn - kun - kun - la - la - la - luksa - luno - malplena - manĝas - mienon - morgaŭ - ne - ne - ne - okazon - plue - poŝo - povas - rapidu - rapidu - sed - sed - ŝanĝas - trovos - vesto - vi - vi - vortoj - vulpo.




Nekrologo

Elmia Tamminen, instruistino en Helsinki, Finnlando, fidela aninco de UEA, forpasis 18 Oktobro 1954.

Ingeborg Fink-Jensen, Vejle, Danlando, 27.IX.54.

Poul Borberg, Danlando, veterano de 1906.

Je la 29-a de Oktobro forpasis pro la sekvoj de aŭto-akcidento **Paul Nyssens** en aĝo de 84 jaroj. Li naskiĝis en 1870 en Antverpeno. Li akiris la diplomon de civila Inĝeniero. Dum vojaĝo en Usono li interesiĝis pri mensa kulturo kaj reveninte en Belgujon starigis Instituton por homa kulturo, kiu portas lian nomon. Li eldonis multajn librojn pri tiu temo kaj unu el ili li esperantigis sub la titolo "Bonhumoro".



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m., 188m. P. (nur 16-II, 16-III). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.45–08.00	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	18.45–19.00	Perpignan-Roussillon. 202m. K.
	22.10–23.50	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.50–23.10	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m., I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.10	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2-II, Mondo Esperantista ; 4-II, Leterkesto kaj bibliografio ; 9-II, Informoj el Italujo ; 11-II, Itala sanktejo Loreto ; 16-II, Opero "La Forto de la Destino" de G. Verdi ; 18-II, Po unu fojo jare decas freneziĝi ; 23-II, Bolonja folkloro ; 25-II, La Cindroj.

Radio Valencia. Jam de pli ol du jaroj interesa programo estas ellaborita en Valencia kun plena helpo de la staciestraro. La duonhora elsendo, sub la titolo "Esperantista Mikrofono", konsistas el hispanlingva propaganda malfermo, parolado, kurso, dulingvaj informoj, novaĵoj kaj hispanlingva fermo. Ni esperu, ke mallongaj ondoj estos iam denove uzataj, ĉar la 200-m. ondlongo malebligas longdistancon aŭskultadon. Ni salutis samtempe la aperon en nia programo de najbara loka stacio Carlet en la hispana provinco Valencia.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 268

1-an de januaro, 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de 1954 kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj ..	11085	10723
Individuaj membroj :		
MJ 920	1075	
MA 3915	3943	
MS 611	741	
Patronoj 6	7	
DM 266	278	
HM 58	59	
	5776	6103
	16861	16826

DELEGITOJ

Finnlando

Hamina (Kymenlääni). S : R. Pystynen, Ilmarinkatu 19.

Jugoslavio

Celje (Slovenio). D : M. Dobčnik, Titov trg. 3.

Nederlando

Bergen op Zoom (Noord-Brabant). D : H. A. Appel, Zuidoost-singel 5.
FD (Instruado) : La D.

Usono

Baltimore (Maryland). D : B. Ela, 9 E. Centre St., Baltimore 2.
VD : E. M. Beck, 218 E. Biddle St., Baltimore 2.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

S. Magalhaes Chaves, Rio de Janeiro, Brazilo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

745. Rose, F-ino E., Toronto, Kanado
746. Peccioli, S-ro I., Jaŭ, Brazilo
747. Rangel Brigido, S-ro Inĝ. M., Niteroi, Brazilo
748. Melo e Sousa, D-ro J. B., Rio de Janeiro, Brazilo
749. Pinheiro Guimarães, D-ro R., Ateno, Grekujo

PATRONO 1955

4. Gueritte, S-ro T. J., Surbiton, Anglujo

La Internacia Konkurso de 1954



Luktante ĝis la lasta momento por gajni la finajn venkopontojn, niaj Kanadaj samideanoj sukcesis per varbado lasthora devigi Finlandon cedi unuan lokon. Ni sekve etendas manon de gratulo al ĉiuj Kanadaj Esperantistoj, kaj aparte al la delegitoj, kiuj ricevos libropremiojn. En tiu lasta kategorio troviĝas ankaŭ unu ne-delegito, kiu sola respondecas pri 85 el la gajnitaj poentoj !

La rezulto signifas ke por la kvara sinsekva jaro, la venkintoj troviĝas sur la amerika kontinento. Evidente, la Nova Mondo estas fekunda tero por niaj varbokampanjoj.

Sed per tiel mallarĝa margeno estas venkita Finnlando, ke ni ne povas ne kondolenci pro ĝia preskaŭa venko kaj kore gratuli pro la konsiderindaj sukcesoj atingitaj dum la jaro. La tiea varbarmeo sukcesis aldoni okdek kvar individuajn membrojn al niaj listoj — precipe en kategorio M.A.

La detala rezulto estas :—

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Kanado ..	250	360	144.0
2. Finnlando ..	2000	2825	141.3
3. Sudafriko ..	300	395	131.7
4. Jugoslavujo ..	1600	1976	123.5
5. Maroko ..	700	845	120.7
6. Svislando ..	1500	1795	119.7
7. Germanujo ..	3600	4215	117.1
8. Urugvajo ..	250	285	114.0
9. Nederlando ..	4600	5150	112.0
10. Svedujo ..	5900	6579	111.5
11. Danlando ..	2500	2775	111.0
12. Italujo ..	2900	3165	109.1

Fino sur kontraŭa kovrilpaĝo

13. Izraelo ..	250	260	104.0
14. Usono ..	2300	2376	103.3
15. Portugalujo ..	500	515	103.0
16. Brazilo ..	6400	6520	101.9
17. Hispanujo ..	1600	1630	101.8
18. Japanujo ..	900	905	100.6
19. Francujo ..	5600	5582	99.7
20. Aŭstralio ..	1000	990	99.0
21. Aŭstrujo ..	850	840	98.8
22. Islando ..	350	345	98.5
23. Norvegujo ..	2300	2239	97.3
24. Britujo ..	9500	8934	94.0
25. Novzelando ..	850	791	93.1
26. Kubo ..	250	220	88.0
27. Belgujo ..	2300	1970	85.7
28. Irlando ..	250	185	74.0
29. Venezuelo ..	250	165	66.0
30. Argentino ..	950	625	65.8

La Internacia Konkurso de 1955 okazos laŭ precize samaj kondiĉoj malgraŭ pli-malaltigo de la kotizo de Patrono. Aljuĝo de poentoj estos : por aliĝo aŭ varbo de Asocio Membro, 1 poento por la koncerna lando ; kaj simile : por MJ, 5 poentoj ; MA 10 ; MS 15 ; Patrono 50 ; Nova Dumviva Membro 50. La Landa Asocio en la venkinta lando ricevos monpremion (£10) kaj diplomon, kaj plie rajtos posedi dum unu jaro la novan silkan flagon de la Internacia Konkurso. Ĉiu delegito tie ricevos libropremion.

La kvoto por via lando en 1955 estas :—

Aŭstralio ..	1000	Jugoslavujo	1750
Aŭstrujo ..	1200	Kanado ..	250
Belgujo ..	2100	Kubo ..	350
Brazilo ..	6400	Maroko ..	750
Britujo ..	9200	Meksikio ..	250
Danlando ..	2500	Nederlando..	4600
Finlando ..	2500	Norvegujo ..	2200
Francujo ..	5100	Novzelando	800
Germanujo ..	3700	Portugalujo	500
Hispanujo ..	1600	Sarlando ..	250
Irlando ..	250	Sud-Afriko ..	350
Islando ..	350	Svedujo ..	5900
Italujo ..	2900	Svislando ..	1600
Izraelo ..	250	Urugvajo ..	300
Japanujo ..	900	Usono ..	2300

Ni kredas, ke ĉiu lando en tiu tabelo havas proksimume egalan eblecon atingi ne nur 100% de sia kvoto, sed ankaŭ la necesan aldonon de poentoj por certigi por si la unuan lokon. Do varbu ! Kaj venku !

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : J. Kosutek 8ŝ. 6p., S-ino M. Marchand 17ŝ. 0p., E. M. Rosher 10ŝ. 0p., S. T. Fuller 5ŝ. 3p., T. J. Gueritte £2 0ŝ. 0p., F-ino I. M. Cochrane 2ŝ. 6p., T. E. Elderkin 5ŝ. 0p., E. C. Hilder 15ŝ. 0p., H. Agnar 7ŝ. 0p., K. Fritzsching 10ŝ. 0p., A. Solar 5ŝ. 0p., J. H. Murray £5 0ŝ. 0p., Said Saleh 6ŝ. 6p., A. Rahman 1ŝ. 0p.

Donacoj al la Fondaĵo Montevideo : Asocio de Esperantistoj en Pollando £2 10ŝ. 0p., S. S. Culbert £2 18ŝ. 4p., Grupo Kufstein 13ŝ. 6p., S-ro Gaber 5ŝ. 6p., S-ro Raimer 8ŝ. 3p., S-ino A. Meurrens 7ŝ. 0p.

Sumo ĝis 31.12.54 : £1,174 7ŝ. 10p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

J. C. RAPLEY, *Sekretario.*

Oni bonvolu noti eraron en Oficiala Informilo 267. La sumo de donacoj al la Fondaĵo Montevideo ĝis 30.11.54 estis £1,167 5ŝ. 3p. (kaj ne £1,466 0ŝ. 3p. kiel montrite).

LA SEKRETARIO DANKAS

La unua tempo en nova posteno estas ĉiam nefacila, kaj transpreninte la laborojn de nia senlaca samideano Goldsmith mi tuj trovis, ke mia sorto ne estas escepto. Sed ekde la unuaj tagoj mi ricevas multajn salutojn kaj ĝentilajn gratulojn, kiuj forviŝas la nubojn kaj igas min senti, ke la ofico, kun sia amaso da laboro, tamen donas al mi enviindan eblon koniĝi amike kun granda nombro da samideanoj en multaj landoj. Volonte mi respondus aparte al ĉiu saluto, sed ĉar fizike mi tion ne povas, tial mi petas ĉiun akcepti mian komune esprimitan dankon kaj koran resaluton.

Ĉe la okazo mi dankas ankaŭ ĉiun, kiu afable inundis la Centran Oficejon per Kristnaskaj kaj novjaraj salutoj. La bondezirojn mi kaj ĉiuj oficistoj tre varme reciprokas.

J. C. Rapley

Pro spacomanko ni devis prokrasti ĝis venonta n-ro la liston de membro-subtenantoj.

ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 3-a de la antaŭa monato.*

Sed la Eternulo estas en Sia sankta templo;
la tuta tero silentu antaŭ Li ! *Hab. 2. 20.*

Giordano Bruno López, Amalia 347,
BUENOS AIRES 8, Argentino, 50-100
p.m. kun Skandinavio.

Sep svedaj gestudentoj, komencantoj,
havos letervesperon en marto. Alilandaj
studentoj skribu al Jernberg, Ovre Slottsg.
5 B, UPPSALA, Svedujo.

Juna esperantisto (17 jaroj) deziras
korespondi kun la tuta mondo, prefere kun
radio-amatoro. Ludwig Wiechers,
NORTHEIM i. Han., Friedrichstr. 9a,
Germanujo.

25-jara oficisto deziras pasigi kelkajn
monatojn laborante en Usono. Celo : pli-
studi vivmanieron. Angla lingvo parolata.
S-ro Forge, 107 rue de Lafond, LA
ROCHELLE, Francujo.

Se vi havas intereson pri interŝanĝado de
moneroj, poŝtmarkoj aŭ simile, bonvolu
skribi al S-ro Bertil Grenzman, Skolgatan
28 b, LINKÖPING, Svedujo.

Junulgrupo "Ekstazo" organizas la 16an
Aprilon propagandcele letervesperon kaj
petas grandamasan alsendon de bildkartoj,
leteroj k.t.p. Respondo garantiata.
Adreso : Celebesstraat 18, LEEUWARDEN,
Nederlando.

Letervesperon kaj ekspozicion aranĝos la
21an de marto 1955 junulara esp.-klubo.
Respondo garantiata. Skribu al : S-ro
Samek Zdeněk, Čajkovského 41, OSTRAVA-
HULVÁKY, Ĉeĥoslovakujo.

Sardinia instruistino, por organizi interesan
kolekton en sia lernejo, petas tutmonde
interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn. Skribu :
Angel Delogu, GHILARZA (Sardinio),
Italio.

Precipe nun, post la historiaj decidoj de
UNESKO en Montevideo, nepre havigu kaj legu la verkon

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO

de **D-ro Ivo Lapenna**
Profesoro de Internacia Juro

"La verko majstre instruas kaj instigas al pensado . . . Ĝi ne estas romano
unufoje legota kaj poste enŝrankigota. Ĝi meritas esti aĉetata kaj ripete
pristudata kaj sisteme dismontrata." *Doc. D-ro S. Pragano en Scienca Revuo.*

"Ĝi estas enhave gravega, lingve bonega, kaj ĝi meritas altan laŭdon kaj
rekomendon." *T. Jung en Heroldo.*

"Ni multon lernos kaj gajnos klarecon samtempe kun informoj kaj ĝenerala
vido . . . D-ro Lapenna verkis popularan libron, facile legeblan en bela kaj
agrabla stilo." *Prof. D-ro E. Privat en "Esperanto".*

"Bele kaj plaĉe prezentita, ĝi estas altvalora laŭ enhavo . . . Ĝi estas
facile komprenebla por ĉiuj nefakuloj dank' al siaj klara stilo kaj preciza
simpleco." *L. Laurat en Sennaciulo.*

Prezo 12 ŝil., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe : **Universala Esperanto-Asocio,**
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
aŭ enlanda libroservo